der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

11. Jahrgang Nr. 73/74 (5/6 1975) 60 Pf

Helsinki kaj ni

Jam pasis iom da tempo, kiam la estroj kaj plej altaj reprezentantoj de 35 ŝtatoj la 1. 8. 1975 subskribis solene en Helsinki la „Finan Akton“ de tiu trifaza kelkjara konferenco, kiu sendube estas unu el la plej rimarkindaj, internaciaj ŝtataj konferencoj en la historio de la homaro.

Unuafoje post la fino de la dua mondmilito, precize 30 jarojn post tio, la ŝtatestroj per sia subskribo akceptis la principojn de la paca kunekzistado por la internaciaj interŝtataj rilatoj en Eŭropo kiel validaj.

Subskribi dokumenton, tamen, estas unu afero, realigi ĝin, dua. Do s ĉiuj progresemaj fortoj nun devas koncentri siajn energion kaj influon, por ke tiu unika rekomendaro de Helsinki materialiĝu en la politika praktiko.

Fundamenta demando ĉi-rilate estas tiu pri senarmigo. Politika malstreĉiĝo sen senarmigo estas kontraŭdiro en si mem. Kaj bedaŭrinde oni ne povas nei, ke militistaj rondoj de kelkaj landoj sukcesis lastatempe antaŭenpuŝi la armigon kiel neniam ajn antaŭe. Danĝera paradokso al Helsinki.

Kion alportis Helşinki por ni, esperantistoj?

Ni, kiuj pretendas proponi gravan rimedon por plifaciligi la internaciajn rilatojn, ni espeantistoj devus aparteni al tiuj, kiuj pleje interesiĝas pri la realigo de la Helsinki-a Fina Akto. Ĉar ties realigo malfermas vojon al internacia kunlaboro historie ankoraŭ neniam spertitan. Kaj kompreneble, tie la lingva problemo ekzistas. Tial certe ne estas hazardo, ke en la parto „Kunlaboro en homaj kaj aliaj sferoj“, punkto 4 „Kunlaboro kaj interŝanĝo en la tereno de klerigado“ la punkto d) amplekse traktas la neceson de la instruado de fremdaj lingvoj.

Do, sendube, ni esperantistoj pleje subtenas la dek principojn de la internaciaj rilatoj kaj ĉiujn aliajn rekomendojn de Helsinki. Ni analizu la Finan Akton laŭ la valoro por ni. Ni disvastigu la scion pri Helsinki kaj batalu por ties realigo. Ĝi estas en ĉies nia intereso.

Rudolf Hahlbohm

La problemo de egalrajteco inter viro kaj virino

La proklamo de l'Asembleo de Orgąnizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, ke 1975 estu Jaro de Virino starigas homaran problemon en la centron de monda atento. UNO konceptis agadprogramon por nuligi la diskriminigon de virino sur ĉiuj terenoj. La dokumento postulas samajn rajtojn por virinoj kiel por viroj, por ke la virino povu partopreni samrange je prosperigo de la socio. La fakto de neegalrajteco inter viro kaj virino estas tiom malnova kiel la klasa socio, originis per ĝi kaj malaperos same kun ĝi.

La praa rilato inter la seksoj baziĝis sur ekonomie kaŭzita egalrangeco kaj egalrajteco, dum la tuta antaŭhistoria evoluetapo de la homaro. Ĉi regadis ĝis disfalo de la homa socio en klasoj, per evoluo de produktivaj fortoj kaj estiĝo de privata proprieto de produktiloj.

La homaro travivis hegemonion de virino, deveninta el divido de laboro kaj poste superregadon de l'viro pro ekonomia supereco. Dum la plua evoluo, la virino ĉiam estis pli malpli senrajta. Tiu ĉi pozicio restis kvazaŭ la sama dum la diversaj socioformacioj, ĝis al la nuna tempo. La homaraj evoluetapoj rezultis el grandaj ŝanĝoj, plibonigoj de produktiloj, eltrovoj kaj esploroj. Sed tasko, medio kaj laboro de la virino ĉe infanoj kaj hejma kuirejo restis preskaŭ la sama dum jarmiloj. Ŝi ne povis partopreni je sociaj aferoj kaj ne uzi klerigĝeblecojn kiel la viro. Ofte kiel tipe inaj estis konsideritaj ŝiaj konduto kaj sinteno kaj influitaj per ŝia socia pozcio. En Eŭropo mezepoka katolika eklezio decide stampis la estimon de kaj la imagon pri la virino. La biblia kreadlegendo devis atesti, ke la virino estas ero de l'viro kaj tial regata per li. Depost la kapitalisma erao la ekspluatado de la virino ne plu okazis patriarke kaŝite, sed senpere kaj malkaŝe. Virinoj kaj infanoj estiĝis profitigaj ekspluatobjektoj en la industriigita produktado.

Per la inkluzivigo de la virino en la produktaj kaj sociaj procedoj malfermiĝis vojo por realigi emancipadon. Friedrich Engels konstatis: „Evidentiĝas, ke la liberigo de la virino, samrangeco kun la viro, ne eblas, dum ŝi estas ekskludita el la socia produktiva laboro kaj limigita je la hejma privata laboro".

La moto de la nuna UNO-deklaro estas: „egalrajteco — prospero — paco". La virino devas esti pli inkluzivigita en ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj procedoj, sur nacia, regiona kaj internacia niveloj.

La Internacia Konsultiĝo de la Komunistaj kaj Laboristaj Partioj 1969 en Moskvo povis konstati: „pli kaj pli virinoj estas okupitaj en produktado kaj aliaj aferoj, kreskas ilia politika konscio, fortiĝis ilia batalo pri ekonomiaj kaj sociaj rajtoj. La laborantaj virinoj postulas ĉesigon de ĉiu diskriminacio rilate al salajroj, ili postulas plenan civitanan samrangigon, aranĝojn pri protekto de patrino k. t. p. . . .

La ekzemplo de la socialismaj landoj, kie estas garantiita plena samrajteco al la virinoj, estas de mobiliziga graveco por la batalo de virinoj en la kapitalisma mondo."

Per la Socialisma Oktobra Revolucio okazis historia ŝanĝo, ankaŭ por la virinoj en la tuta mondo. Sovetunio donis ekzemplon por vera liberigo de virino, post jarcentoj de ekspluato, subpremo, diskriminacio kaj malestimo. Post la dua mondmilito la landoj de la socialisma ŝtataro sekvis tiun ĉi vojon.

En Germana Demokratia Respubliko la konkludoj kaj konvencioj de UNO estas realigitaj. Post la liberigo el faŝismo per la soveta armeo komenciĝis nova vivo en homa digno por la virinoj. Emançipado dekomence estis imanenta elemento de la ŝtata politiko en GDR.

La rajtoj de virino estas garantiitaj per konstitucio kaj civila kodo. Edukado kaj instrutemoj en lernejoj estas samaj por knaboj kaj knabinoj. Celkonforme kaj kontinue estis realigitaj i. a.: sama salajro por sama laboro — rajto pri klerigado — protekto de patrino kaj infano — memdecido de virino pri gravedeco. Dume ŝanĝiĝis la personeco de la virino. La garantiita egalrajteco inter virino kaj viro estas unu el la plej grandaj akiraĵoj de la socialisma ŝtato. Viroj kaj virinoj plenaj de iniciativo kaj ideoj konstruas komune ŝtaton de paco kaj demokratio.

84,5 procentoj de la laborkapablaj virinoj laboras profesie, lernas aŭ studadas. Triono de la deputitoj estas virinoj kaj ĉiu kvina urbestro aŭ komunumestro estas virino. Ĉiu tria direktoro de lernejo kaj juĝisto kaj ĉiu dua skabeno estas virino. Preskaŭ la duonon da studadlokoj en unversitatoj kaj altlernejoj okupas virinoj. Post fino de lernejo 99 procentoj de la knabinoj eklernas profesion. 56 procentoj de la laborantinoj estas plene klerigitaj por la profesio. Duono de la membraro kaj funkciuloj en sindikatoj estas virinoj.

La tasko prepari la Mondkongreson de la Internacia Demokratia Federacio de Virino 1975 en Berlin, estas granda honoro kaj agnosko por GDR.

Realigo de plena emancipado estas multflanka kaj problemriĉa procedo. Ne eblas venki dum nur unu generacio, kio estis reganta praktiko kaj destina morala principo dum jarcentoj. Sed nur la socialismo povas krei la eblecojn por plena prospero de personeco por ĉiuj siaj membroj. Batali por la liberigo de la virino signifas batali por la realigo de fundamentaj homaj rajtoj kaj kontraŭ imperiismo, rasismo kaj faŝismo.

Ankoraŭ virinoj devas batali por plej simplaj legitimaj rajtoj. Milionoj da laboristaj virinoj suferas pro prezoaltiĝado, kaj la timo pro taga pano ĉiam pli grandiĝas.

En la konvencioj de UNO eĉ temas ankoraŭ pri ekstermo de ĉiuj formoj de sklavigo, komerco pri virinoj kaj ekspluatado per prostituigo. Ankoraŭ estas plenumendaj por multaj virinoj en la mondo: balotrajto, jura memstareco, protekto dum gravedeco kaj propra civitaneco. La Germana Demokratia Respubliko konsentas kaj subtenas plene la humanisman programon de UNO pri realigo de tiuj legitimaj rajtoj de ĉiu virino.

Thomas Mann
1875–1975

Thomas Mann, kies naskiĝtago revenas ĉijare la centan fojon, rangas kiel romanverkisto, novelisto kaj eseisto inter la plej elstaraj literaturistoj en la unua duono de la 20-a jarcento. Kiel filo de grandkomercisto li naskiĝis la 6-an de junio 1875 en Lübeck kaj mortis la 12-an de aŭgusto 1955 en Zürich. Li studis kaj unue verkis en München. Krom per multaj eseoj, en kiuj li pritraktis la temon pri la arto kaj pri la pozicio de la arto kaj la artisto en la reala vivo, sed poste ankaŭ pri la politika pozicio kaj efiko de la burĝa verkisto, li elstaras precipe per siaj grandaj romanoj. Tiuj estas: „La familio Buddenbrook“ (1901, prezentanta la nehaltigeblan malsupreniron de komercista familio tra kvar generacioj kiel simbolo por la diseriĝo kaj finiĝo de la burĝa socio entute); „La sorĉa monto“ (1924, kleriga kaj eduka romano, en kiu manifestiĝas lia maturiĝo de „senpolitikulo“ al verkisto agnoskanta la devon al politika partieco); „Josefo kaj liaj fratoj“ (1933/43, granda, kvarvoluma poemo pri humaneco manifestiĝanta en la agado de la heroo por la socio); „Lotte en Weimar“ (1939, kun Goethe kiel centra figuro, montranta al la mondo, kontraste al la faŝisma, pli bonan Germanion); „Doktoro Faŭstus“ (1947, kultur- kaj epokromano, montranta al la arto la vojon al la popolo); „La konfesoj de la kavaliro-fripono Felix Krull“ (1954; prezentanta la problemon pri la artisto en la burĝa socio en humora-burleska formo).

Dum sia tuta vivo Thomas Mann luktis kun la problemo de la burĝa ekzistado kaj ties ekzistorajto. Li estis ĉiam la granda kronikisto de la burĝa disfalo, kiun li tamen ne sentis kiel mondpereon, sed kiel la plenumon de historia verdikto. Kvankam li neniam atingis la komprenon por la proletaro kaj ne prezentis ĝin literature, li tamen ekhavis je la fino de sia vivo certan senton pri la forto kaj rolo de la proletaro kaj manifestis tion ekz. per la konata eldiro pri la „kontraŭkomunismo kiel la baza malsaĝeco de nia epoko“. Komence li estis tre malinklina al politikaj konfesoj, sed sub la efiko de la mondhistoria evoluo li esprimis siajn politikajn konvinkojn pli kaj pli akre, precipe en la batalo kontraŭ faŝismo kaj naziismo.

Pri la problemo de la faŝismigaj tendencoj de sia tempo, pri la kontraŭspirita sinteno de la faŝismo kaj pri ties metodo uzi delogajn-magiajn rimedojn por la akirado de la potenco,Th. Mann unue okupiĝis arte en la novelo „Mario kaj la magiisto“ (1930). En trafa antaŭdiro li montras en tiu novelo, ke la faŝismo estas renkontebla kaj venkebla nur perforte.

En „Mario kaj la magiisto“ la faŝismo estas enkorpigita per la figuro de la ĝibulo Cipolla, kiu aranĝis en malgranda itala banloko publikan prezentadon kiel prestidigitisto[1]) kaj iluziisto, sed fakte li pruviĝas hipnotigisto,

kiu serĉas kaj trovas sian diablan plezuron en la kompleta submetigo ne nur de unuopaj personoj, sed de la tuta spektantaro sub sian volon. Nur Mario, la kelnero pri kiu Cipolla okupiĝis kiel lasta, trovas la forton liberigi sin kaj la ceterajn spektantojn el la hipnota tranco.
La ĉi-suba fragmento el tiu novelo montras la manieron, per kiu la magiisto Cipolla (nomanta sin mem „kavaliro“) trudas sian volon al unuopaj spektantoj, kiuj submetiĝas parte senreziste, parte nur post forta, sed finfine senefika rezisto.

---

1) Laŭ PIV, Iluziisto, kiu estigas ĉe spektantoj iluziojn per la movlerteco de la manoj (germ. Gaukler)

Thomas Mann

EL „Mario kaj la Magiisto“

tradukis D-ro K. Schulze

Eĉ malpli mi forgesos, pro ĝia komiko kortuŝa kaj fantoma, la scenon kun sinjorino Angiolieri. Certe la kavaliro rimarkis ŝian eteran senrezistecon kontraŭ sia potenco jam dum sia unua malrespekta ĉirkaŭrigardo en la salono. Per pura ensorĉado li efektive tiris ŝin de sur ŝia seĝo, el ŝia vico, fortiris ŝin kun si. Por pli bone briligi sian lumon, li antaŭe komisiis sinjoron Angiolieri, ke li voku sian edzinon per antaŭnomo, ke li tiamaniere kvazaŭ ĵetu en la pesilteleron la pezon de sia ekzistado kaj de siaj rajtoj kaj per edza voĉo veku en la animo de la kunulino ĉion, kio povas ŝirmi ŝian virton kontraŭ malbona sorĉado. Sed kiom vane tio okazis! Cipolla, en kelka distanco de la geedzoj, unufoje fajfigis sian vipon. Tio efikis, ke nia mastrino forte ektremis kaj turnis sian vizaĝon al li. „Sofronia!“ sinjoro Angiolieri kriis jam nun (ĝis tiam ni tute ne sciis, ke sinjorino Angiolieri havas la antaŭmomon Sofronia), kaj prave li komencis voki, ĉar ĉiuj vidis, ke danĝero minacas: la vizaĝo de lia edzino restis senmove turnita al la malbenita kavaliro. Tiu, pendiginte la vipon sur la manartikon, per ĉiuj siaj dek longaj kaj flavaj fingroj nun komencis efektivigi venigantajn kaj tirantajn gestojn kontraŭ sia viktimo kaj paŝon post paŝo iri returnen. Jen sinjorino Angiolieri en brila paleco leviĝis de sia sidejo, tute turniĝis al la flanko de la ekzorcanto kaj komencis ŝvebi post li. Fantoma kaj fatala rigardo! Kun lunatika mieno, kun brakoj rigidaj, kun la belaj manoj iomete levitaj el la artikoj kaj kvazaŭ ne uzante la piedojn, ŝi ŝajne glitis malrapide el sia benko, post la tirantan deloganton. „Voku, sinjoro, voku do!“ admonis la terorulo. Kaj sinjoro Angiolieri vokis per malforta voĉo: „Sofronia!“ Ho, plurfoje li ankoraŭ vokis kaj, ĉar lia edzino pli kaj pli malproksimiĝis de li, eĉ levis unu kavigitan manon el la buŝo kaj gestis per la alia dum la vokado. Sed senpove la mizera voĉo de amo kaj devo forefiis en la dorso de tiu perditino, kaj per lunatika glitado, ravita kaj surda, sinjorino Angiolieri ŝvebadis laŭ la centra koridoro, sekvante la fingrantan ĝibulon direkte al la elirpordo. Deviga kaj perfekta estis la impreso, ke ĝis la fino de la mondo ŝi tiel sekvus la majstron, se tiu volus.
„Accidente!“*) sinjoro Angiolieri kriis en vera teruro kaj eksaltis, kiam la salona pordo estis atingita. Sed sammomente la kavaliro kvazaŭ rezignis pri la venkokrono kaj

---

*) (it): Akcidento!

ĉesigis la eksperimenton. „Sufiĉe, sinjorino, mi dankas vin“, li diris, kaj per komedianta kavalireco li prezentis la brakon al ŝi, kiu rekonsciiĝis el fantastaj nuboj, por konduki ŝin al sinjoro Angiolieri „Sinjoro“, li salutis tiun, „jen via edzino! Sendifekta, kun miaj komplimentoj, mi reliveras ŝin en viajn manojn. Gardu per ĉiuj fortoj de via vireco trezoron, kiu ja tute estas la via, kaj vigligu vian gardemon per la kompreno, ke ekzistas potencoj, kiuj estas pli fortaj ol racio kaj virto kaj estas nur escepte parigitaj kun la altanimeco de rezignacio!“

Kompatinda sinjoro Angiolieri, silenta kaj kalva! Li ne aspektis, kvazaŭ li povus ŝirmi sian feliĉon eĉ kontraŭ malpli demonaj potencoj ol estis tiuj, kiuj tiuokaze aldonis al la teruro ankoraŭ la mokon. Parade kaj fierośvelite la kavaliro reiris al la podio sub aplaŭdo, al kiu lia elokvento donis duoblan plenecon. Precipe per tiu venko, se mi ne eraras, lia aŭtoritato atingis tian gradon, ke li povis dancigi sian publikon — jes. dancigi. Tio devas esti komprenata tute laŭvorte kaj sekvigis certagradan ekscesón, iun meznoktan kaoson de la animoj, ebrian forigon de la kritikaj rezistoj, kiuj tiel longe kontraŭis al la agado de la malagrabla viro. Estas vere, ke li devis streĉe batali por la perfektigo de sia regado, speciale kontraŭ la ribelemo de la juna roma sinjoro, kies morala obstinado minacis esti publika ekzemplo danĝera al tiu regado. Prudente li elektis la lokon de la plej malgranda rezisto kiel atakpunkton kaj enkondukis la dancorgion per tiu malforta junulo inklina al senspiritigo, kiun li antaŭe jam tiom rigidigis. Kiam la majstro nur tuŝis tiun junulon per rigardo, li tuj retroĵetis la trunkon kvazaŭ fulmtrafita kaj, kun la manoj ĉe la femuroj, falis en staton de militista somnambulismo. Tiamaniere lia preteco al ĉiu sensencaĵo, kiun oni al li surmetus, dekomence frapis la okulojn. Eĉ ŝajnis, ke tia servuteco de volo tute plaĉis al li kaj ke li volonte rezignis pri sia mizera memdetermino; ĉar ĉiam denove li sin proponis kiel eksperimentobjekton, kaj evidente estis por li honoro prezenti modelon pri tuja senanimigo kaj senvoleco. Ankaŭ nun li suriris la podion. La kavaliro nur bezonis substreki sian ordonon per unu bato de la vipo tra la aero, kaj jam la junulo dancis tie supre „Step“-on, tio estas, en speco de plaĉa ekstazo, kun fermitaj okuloj kaj balancigánta kapo, li ĵetegis siajn mizerajn membrojn ĉiuflanken.

Evidente tio estis amuza, kaj ne daŭris longe, ĝis li trovis kunagantojn. Du pliaj personoj, junuloj, la unu en modestaj kaj la alia en bonaj vestoj, ankaŭ efektivigis la „Step“-on ambaŭflanke de li. En tiu momento okazis, ke la sinjoro el Romo petis la parolon kaj spiteme demandis, ĉu la kavaliro deklaras sin kapabla lernigi al li danci, eĉ se li ne volas.

„Eĉ se vi ne volas!“ Cipolla respondis per tono, kiu estas por mi neforgesebla. Ankoraŭ nun mi havas tiun teruran „Anche se non vuole!“ en la oreloj. Kaj nun la batalo komenciĝis. Cipolla, preninte glaseton kaj ekbruliginte freŝan cigaredon, starigis la romanon ie en la meza koridoro, kun la vizaĝo turnita al la elirpordo. Li mem ekstaris malantaŭ li en kelka distanco kaj fajfigis sian vipon, ordonante: „Balla!“*; Lia kontraŭulo ne moviĝis. „Balla!“ la kavaliro ripetis kun decideco kaj klakis. Oni vidis, kiel la juna viro ekmovis la kolon en la kolumo kaj kiel samtempe unu el liaj manoj leviĝis el la artiko, unu el liaj kalkanoj turniĝis eksteren. Sed longtempe restis ĉe tiaj signoj de tikanta tento, signoj, kiuj jen plifortiĝis, jen ree trankviliĝis. Ĉiuj ekkonis, ke antaŭ decido pri energia rezisto, heroa obstineco devis esti venkataj; tiu bravulo volis savi la honoron de la homa gento, li tikis, sed li

*) (it): Dancu!

ne dancis. La eksperimento tiom longe etendiĝis, ke la kavaliro estis devigita dividi sian atenton; de tempo al tempo li turnis sin al la scenejo kaj al la tie baraktantoj kaj fajfigis sian vipon kontraŭ ili, por teni ilin sub disciplino. Dume, parolante flanken, li ne povis ne informi la publikon pri tio, ke tiuj petoluloj poste sentos nenian laciĝon, kiom ajn longe ili dancos, ĉar envere estis ne ili, kiuj tion faris, sed li. Poste li ree boris la rigardon en la nukon de la romano por ataki la fortreson de volo, kiu starigis sin kontraŭ sia regado.

Oni vidis ĝin ŝanceliĝi, tiun fortreson, sub liaj batoj ree kaj ree ripetitaj kaj sub liaj persistaj alvokoj, — vidis tion per objektiva partopreno, kiu ne estis libera de afekciaj elementoj, de bedaŭro kaj kruela kontentiĝo. Se mi ĝuste komprenis la okazaĵon, la malvenko de tiu sinjoro devenis de la negativeco de lia batalpozicio. Verŝajne oni ne povas anime vivi per nevolado; voli ne fari ion, tio ne estas vivenhavo por la daŭro; ne voli ion kaj tute ne plu voli, do tamen fari la postulatan, tio eble kuŝas tiom najbara, ke el tio ekestas danĝero por la ideo de libereco. Tiudirekte moviĝis ankaŭ la persvadoj, kiujn la kavaliro interpoletis inter vipobatoj kaj ordonoj, miksante efikojn, kiuj estis lia sekreto, kun konfuzige psikologia influado. „Balla!“ li diris. „Kiu tiom sin turmentos? Ĉu vi nomas tion libereco — tiun perfortadon de vi mem? Unu ballatima!* ja ŝiriĝas je ĉiuj viaj membroj. Kiel bone estos, finfine lasi al ili la volon! Jen, vi ja jam dancas! Tio ne plu estas batalo, tio estas jam plezuro!“ — Tiel estis. La tikado kaj tirado en la korpo de la kontraŭstaremulo plioftiĝis, li levis la brakojn, la genuojn, subite ĉiuj liaj artikoj malrigidiĝis, li ĵetis la membrojn, li dancis. Kaj tiel, dum la homoj aplaŭdis, la kavaliro kondukis lin sur la podion por alvicigi lin al la aliaj marionetoj. Oni nun vidis la vizaĝon de la subigito. ĝi estis publikigita tie supre. Li ridetis larĝe, kun duone fermitaj okuloj, dum li „amuziĝis“. Estis speco de konsolo vidi, ke nun li evidente sentis sin pli bone ol dum la tempo de sia fiero. . . .

*) (it): Danceto!

Ĥoĝa Nasriddin Alfandi

Kiamaniere la hundo povas fariĝi plej kolerema?

Iufoje, la reganto de la urbo alvokis Afandi kaj ordonis al li: „Trovu por mi la plej kolereman hundon!“
Post longa serĉado Afandi venigis al la reganto la plej kvietan hundon.
„Kion vi venigis al mi?, diris kolere la reganto, ĝi estas ne hundo, sed ŝafo!“
„Estu trankvila, via moŝto, — respondis al li Afandi, — ĝi iom vivos kun vi kaj ĝi fariĝos la plej kolerema, same kiel ĝia mastro.“

Abonnement des „der esperantist“ ab 1976 nur über die Deutsche Post!

Wir weisen nochmals darauf hin, daß ab 1976 „der esperantist“ nur durch die Deutsche Post zu beziehen ist und zu diesem Zweck der Zentrale Arbeitskreis Esperanto von jedem Interessenten eine Mitteilung benötigt, daß er die Zeitschrift (in wieviel Exemplaren) abonnieren möchte.

Die Erscheinungsweise konnte, wie 1975 deutlich wurde, fast wieder völlig normalisiert werden. Schreiben Sie also an den Zentralen Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR, 108 Berlin, Charlottenstr. 60.

Redaktion

Damit die Arbeiter verschiedener Muttersprachen sich miteinander verständigen können

Auszüge aus einem Interview mit Sándor Gáspár

Sándor Gáspár ist der Generalsekretär des Zentralrates der Ungarischen Gewerkschaften und Mitglied des Politbüros der USAP.

Das Interview erschien in ungarischer Sprache u. a. in „Eszperantómagazin" 9/74, in Esperanto in „Hungara Vivo" 5/74 und in „Hungara Fervojista Mondo" 4/1974. In deutscher Sprache wurde das Interview gekürzt in „Rundschau der Ungarischen Gewerkschaften" 12/1974 veröffentlicht. Den selben Text veröffentlichten auch anderssprachige Ausgaben der gleichen Zeitschrift. *Red.*

Die Esperantobewegung verknüpfen schon seit ihren Anfängen viele Fäden mit den verschiedensten Organisationen der Arbeiterbewegung, hauptsächlich mit den Gewerkschaften. Dies brachte die Entwicklung in vielen Ländern mit sich, so auch in Ungarn. Die Sache einer internationalen Sprache ist nämlich mit dem Internationalismus der Arbeiterbewegung durch eine tiefe ideologische Verwandtschaft verbunden. Der Ungarische Esperantistenverband ist demzufolge schon seit längerem unter der Obhut der Gewerkschaften tätig. Aber sowohl in Ungarn als auch weltweit erstarken die Bestrebungen, die Gewerkschaften sollten die Zielsetzungen dieser sprachlichen Bewegung weitaus intensiver fördern als bisher, und zwar vor allem dadurch, daß sie den Esperantounterricht offiziell unterstützen und dann seine Nutzung durch den Einsatz des Esperanto bei den internationalen Beziehungen der Gewerkschaftsbewegung und der Arbeiter zu verwirklichen helfen.

Die in Ungarn erscheinenden Zeitschriften „Esperanto-Magazin" und „Hungara Vivo" baten Sándor Gáspár, Generalsekretär des Zentralrates der Ungarischen Gewerkschaften, um ein Interview über die Rolle des Esperanto in der Gewerkschaftsbewegung. Im folgenden zitieren wir einige Teile des Gesprächs.

. . . und offen steht die Welt vor jedermann . . .

„Wie sehen Sie die Rolle dieser Sprache in der Weltbewegung der Gewerkschaften und innerhalb deren in den internationalen Beziehungen der Gewerkschaften?"

„Die ungarische Bewegung unterhält sehr breite internationale Beziehungen zu den nationalen Spitzenorganen, aber auch zu den Berufsgewerkschaften und zu den Betriebsorganisationen ausländischer Gewerkschaften", begann Sándor Gáspár seine Antwort. „Diese Beziehungen gestalten sich stets intensiver und erweitern sich. Die Gewerkschaften in den sozialistischen Ländern interessieren sich vor allem für die Methoden unserer Arbeit. Die Gewerkschaften in den kapitalistischen Ländern verfolgen unsere Bewegung ebenfalls mit regem Interesse und noch mehr die dortigen Werktätigen, die anläßlich von Besuchen und sonstigen Kontaktaufnahmen zur Lösung ihrer eigenen Probleme Informationen über die Lage in Ungarn erhalten wollen. Die Gewerkschaften in den Entwicklungsländern interessieren sich hauptsächlich dafür, welchen Platz die ungarischen Gewerkschaften in der Gesellschaft einnehmen, welche Aufgaben sie erfüllen und welche Erfolge sie im sozialistischen Aufbau erzielt haben.

Das Interesse dieser Art ist sehr beehrend, und wir bemühen uns auch, diesem im Geist der internationalistischen Arbeitersolidarität gerecht zu werden. Die aus vielen Ländern kommenden Gewerkschaftsmitglieder, Funktionäre und Delegierten sind willkommene Gäste bei uns. Wir sind bestrebt, ihnen auch mit unseren in vielen Fremdsprachen erscheinenden Publikationen Informationen zu bieten. Unsere persönlichen Besprechungen und Verhandlungen werden selbstverständlich meistens mit Hilfe von Dolmetschern geführt. Das gegenseitige Verständnis wird durch die sprachlichen Schwierigkeiten natürlich erschwert.

Auch unsere Gewerkschaftsleiter, Aktivisten und Gewerkschaftsmitglieder reisen sehr viel, sie besuchen viele Länder. Auf diese Weise lernen auch wir die Arbeits- und Kampfeserfahrungen der Gewerkschaften anderer Länder kennen. Wir sind bestrebt, auch die Beziehungen zu den Gewerkschaften der kapitalistischen Länder zu entwickeln, die – ich hoffe es und halte es auch für wahrscheinlich — in der Zukunft immer vielseitiger werden und nicht nur die Gebiete Kultur und Sport, sondern zahlreiche wichtige Fragen des Lebens, der Gewerkschaftsbewegung umfassen werden.

Es liegt auf der Hand, daß die sprachliche Isolierung bei den gegenseitigen Beziehungen ein Hindernis bedeutet, sowohl für uns als auch für die verschiedene Sprachen sprechenden Funktionäre, Delegierten und im allgemeinen für alle Gewerkschaftsmitglieder und Werktätige. Es wäre also zu begrüßen, die sprachlichen Schwierigkeiten zu vermindern, damit wir uns gegenseitig näher kennenlernen und besser verstehen können. Stehen doch unsere Zielsetzungen und Aufgaben im Mittelpunkt des allseitigen gemeinsamen Interesses.

Demzufolge sind wir gern bereit, mit allen Gewerkschaften zusammenzuarbeiten, die unsere Ansicht teilen, daß das Esperanto die Annäherung der Gewerkschaften, der Gewerkschaftsmitglieder der verschiedenen Länder erleichtern, zu ihrem gegenseitigen Verständnis beitragen kann. Zu einem geeigneten Zeitpunkt wollen wir auch auf den internationalen Foren der Gewerkschaften eine gemeinsame Stellungnahme zur Förderung des Esperanto unterbreiten."

Unter der Obhut der internationalen Gewerkschaftsbewegung

„Praktisch gesehen bedeuten also Ihre Mitteilungen, daß der Zentralrat der Ungarischen Gewerkschaften nach entsprechender Vorbereitung dem Weltgewerkschaftsbund einen Vorschlag unterbreiten und sich dafür einsetzen wird, daß diese auch für die Arbeiterbewegung sehr wichtige Frage von großer Tragkraft auf die Tagesordnung kommt?"

„Ja, meines Erachtens könnten die ungarischen Gewerkschaften zu geeigneter Zeit bei dem Weltgewerkschaftsbund bekanntgeben, daß sie das Esperanto für eine sehr nützliche sprachliche Hilfe im Interesse der gegenseitigen Annäherung sowie der Ausdehnung der Beziehungen halten. Darum würden wir auch die entsprechende Besprechung der Frage vorschlagen. Die freie Stellungnahme ist dabei natürlich das souveräne Recht aller betroffenen Gewerkschaften und Gewerkschaftsbünde, und wir müssen ihre Stellungnahme respektieren.

Wenn dann aufgrund der ungarischen Initiative der Weltgewerkschaftsbund zu einer positiven Stellungnahme gelangen würde, könnten auch mit dem Internationalen Bund Freier Gewerkschaften Verhandlungen aufgenommen werden, um so mehr, als in den ihm angehörenden Gewerkschaften das Esperanto ebenfalls viele Anhänger besitzt.

Es würde uns selbstverständlich sehr freuen, wenn wir in dieser Frage bei dem Weltgewerkschaftsbund Ergebnisse erzielen könnten und der

Sándor Gáspár pri Esperanto

Sándor Gáspár estas la Unua Sekretario de la Landa Konsilio de Hungaraj Sindikatoj kaj membro de la Politburoo de la Hungara Socialisma Laborista Partio. La intervjuo aperis en la hungara originalo i. a. en „Eszperantó-magazin“ 9/74. La esperanta traduko de L. Tárkony aperis en „Hungara Vivo“ 5/74 kaj en „Hungara Fervojista Mondo“ 4/1974. La germana kaj alilingvaj tradukoj aperis en la por-eksterlanda revuo „Revuo de la hungaraj sindikatoj“. Tiu revuo aperas i. a. ankaŭ en germana lingvo. En n-ro 12/1974 aperis la germana traduko de la intervjuo, tamen koncizigita kaj iom prilaborita. Tial ambaŭ versioj ne estas tute identaj. Evidente la esperanta traduko plene respondas al la hungara originalo. Kvankam ni jam represis parton el la intervjuo de k-do Gáspár en „der esperantist“ 67/68 (5/6 1974) paĝo 16, ni opinias tion intervjuon tiel grava, ke ni decidis represi ĝin esperante kaj germanlingve.

La Red.

La aferon de la internacia lingvo ligas profunda idea parenceco al la internaciismo de la laborista movado. Dank' al tio, la Hungara Esperanto-Asocio, ekzemple, jam delonge agadas sub la patronado de la sindikatoj. Kaj tutmonde ŝajnas plifortiĝi la klopodo, ke la sindikatoj subtenu nian aferon pli forte ol ĝisnune, antaŭ ĉio per la akcelo de la sindikata movado, en la internaciaj rilatoj de la laboristoj.

Tiu ĉi penso aperis jam ankaŭ pli frue. Ĝin lanĉis sindikataj gvidantoj de pluraj landoj en tiu spirito, en kiu Barbusse, la granda franca verkisto diris: „Ni, socialistoj devas kapti ambaŭmane la mirindan ŝlosilon, kiu malfermas por ĉiu la tutan mondon. Tiu ŝlosilo estas Esperanto.“ De tiam multaj laboristoj „kaptis“ tiun ŝlosilon, sed ankoraŭ mankis eblo por universala sindikata iniciato. En la pasintaj jardekoj signife plidensiĝis la internaciaj rilatoj de la sindikatoj, la instigo de Barbusse do estas pli aktuala ol iam. Tial H. V. kaj la hungarlingva Eszperantó Magazin petis intervjuon de Sándor Gáspár, membro de la Politika Komitato de la Hung. Socialisma Laborista Partio, ĉefsekretario de la Landa Konsilio de la Sindikatoj kaj gvidanta persono en la internacia sindikata movado. Unue ni demandis lin:

Por la reciproka interkoniĝo

– Kiel vi vidas la lingvajn malfacilaĵojn en la sindikata mondmovado kaj interne de ĝi en la hungaraj sindikatoj?

S. G.: „La hungara sindikata movado havas tre vastajn internaciajn interrilatojn kun la landaj pintorganizaĵoj kaj ankaŭ kun iliaj metiaj, uzinaj, organizaĵoj.

Tiuj interrilatoj pli kaj pli intensiĝas. La sindikatojn de la socialismaj landoj interesas inter aliaj la metodoj de nia agado. Kun vigla atento observadas nian movadon ankaŭ la sindikatoj de la kapitalismaj landoj,

---

WGB mit dem IBFG diesbezüglich erfolgreiche Besprechungen durchführen würde.

So könnten wir auch in der weiteren Entwicklung des Esperanto zusammenarbeiten. Es wäre demnach erwünscht, daß der WGB und IBFG hierüber Gespräche führen und zu einer Übereinkunft gelangen würde.“

Imre Szenes

eĉ pli la tieaj laboristoj; ĉi tiuj, ĉe renkontoj kaj aliaj kontaktiĝoj, deziras informiĝi pri tio, kiel ni solvis multajn problemojn ĉe ili ekzistantajn. La sindikatojn de la evoluantaj landoj interesas precipe tio, kian lokon kaj rolon en la socio havas la hungaraj sindikatoj kaj kiajn rezultojn ili atingis en la socialisma konstruado.

Tia atento nin honoras kaj ni klopodas kontentigi la interesiĝon en la signo de la internacia laborista solidareco. La sindikatanoj, postenuloj, delegitoj estas ĉe ni ĝoje akceptitaj gastoj. Ni provizas ilin ankaŭ per niaj fremdlingvaj sindikataj eldonaĵoj. Niaj personaj interparoloj, traktadoj okazas helpe de interpretistoj; tio, kompreneble malfaciligas en certa mezuro la reciprokan komprenon, ekzistas do lingva problemo.

Niaj sindikataj gvidantoj kaj aktivuloj kaj ankaŭ niaj membroj iradas en la mondo diversloke, kaj akiras spertojn pri la laboro kaj bataloj de la eksterlandaj sindikatoj. Tial ankaŭ kun la sindikatoj de la kapitalismaj landoj ni deziras evoluigi la interrilatojn. Mi esperas kaj opinias verŝajna, ke en la futuro tiuj interrilatoj estos pli kaj pli multflankaj, kaj krom la kulturaj, sportaj kaj aliaj terenoj ili etendiĝos al multaj gravaj problemoj de la movado.

Estas evidente, ke la lingva izoliteco efikas malhelpe al la internaciaj interrilatoj. Estas do bone malpliigi la lingvajn malfacilaĵojn, por ke pli bone ni ekkonu kaj komprenu unuj la aliajn. Niaj celoj kaj taskoj estas ja de komuna intereso. Tial ni salutas kaj laŭ niaj ebloj ankaŭ subtenas Esperanton, kiu servas la pliintensigon de la internaciaj rilatoj, kaj ni subtenas ankaŭ la E-movadon.

Laŭ mia opinio Esperanto povus havi signifan rolon en la pli bona konigo de la vivo kaj sindikata movado de la diverslingvaj laboristoj. Ĝi povus grave helpi en tio, ke la lingvoproblemo estu malpli embarasa kaj fine estu solvita. Ĉe tio ĉiamaniere estas intereso de ĉiuj sindikatoj de la mondo, pri kia-ajn-landa sindikata movado temas."

Ni kunlaboras por la disvastigo de Esperanto

— *Ni ĝojas, ke kamarado Gáspár tiel pritaksas E-on. Tial mi parolus ankaŭ pri aliaj lingvaj problemoj sindikato-koncernaj. Plilarĝiĝis la internacia laborista turismo kaj la internaciaj feriaj ŝanĝ-ripozigoj, organizataj de la sindikatoj. Kreskas la nombro ankaŭ de tiuj faklaboristoj, kiuj okaze de eksportaj mendoj aŭ kunlaboroj laboras eksterlande dum pli-malpli longa tempo. Ankoraŭ plinombraj estas la laboristoj kun ili laborantaj en la akceptantaj landoj. Por la laboristoj de la evoluantaj landoj tia kunlaboro signifas ankaŭ fakan aŭ perfektigan kurson. Sed oni ne povas starigi interpretiston apud ĉiun eksterlandan muntiston! Ĉu kamarado Gáspár ne pensas, ke la internacia sindikata movado devus okupiĝi ankaŭ pri ĉi tiu problemo? Kaj ĉu oni ne devus rekomendi al la laboristoj, laŭ internacia interkonsento de la sindikatoj, ĝuste la plej facilan lingvon, Esperanton? Kio estas via opinio pri ĉi tiu eblo?*

S. G.: „Kiel tutmonde, ankaŭ ĉe ni, unu el la noblaj celoj de la sindikata movado estas plilarĝigi la internaciajn rilatojn sur sindikata tereno, per sindikataj rimedoj. Ĉion, kio tion helpas — kaj mia konvinkiĝo estas, ke Esperanto tion helpas — ni subtenas laŭ niaj fortoj. Mi opinias preskaŭ certa, ke tiu propono, ke la sindikatoj helpu la lernon de Esperanto per internacia interkonsento kaj rekomendo, trovas aprobon ĉe la sindikatanoj kaj sindikata movado de multaj landoj kaj ankaŭ ĉe la internacia korporacio de la sindikatoj.

Tial ni estas pretaj kunlabori kun tiuj sindikatoj, laŭ kiuj Esperanto plifaciligus la interproksimiĝon, interkompreniĝon de la diverslandaj

sindikatoj kaj sindikatanoj. Por tio, en konvena tempo, sur la internaciaj forumoj de la sindikatoj ni ankaŭ proponus pridiskuti ĉi tiun gravan problemon, kaj, se ni atingas konsenton, fari ankaŭ rezolucion por la disvastigo de Esperanto inter la sindikatanoj-laboristoj."

Por plievoluigo de niaj interrilatoj

— Ĉu tiuj gravaj kaj esperigaj konstatoj de kamarado Gáspár do signifas, ke la Landa Konsilio de Sindikatoj turnus sin post la necesa preparado al la Sindikata Mondligo kun la propono, ke oni metu al tagordo ĉi tiun gravan internaciistan demandon?

S. G.: „Jes. Mi pensas, ke la hungaraj sindikatoj, en konvena tempo, esprimus ĉe la Sindikata Mondligo, ke ili rigardas Esperanton kiel utilan lingvan helpon por reciproka interkoniĝo, por interŝanĝo de spertoj, por interproksimiĝo, por evoluigo de la interrilatoj. Tial ni proponus konvenan pritraktadon de la afero.

Estas nature, ke la sindikatoj kaj sindikataj ligoj havas suverenan rajton difini sian starpunkton. Kaj tiun rajton ni devas respekti."

Por ĉiu bona afero — preta diskuti

„La suverenaj rajtoj estas evidentaj. Sed dum ĉiu internacia pritraktado okazas diskutoj. Oni devus, niaopinie, ankoraŭ diskuti kun la eventualaj kontraŭargumentoj. Ekzemple mencii — ĉar pruvi ne necesas — ke la grandega plimulto de la laboristoj-sindikatanoj de la mondo neniam, nenie lernos iun ajn fremdan nacian lingvon. Tamen granda parto el ili volonte lernus tian facilan lingvon kiel Esperanto, sed nur tiam, se internacia konsento de la sindikatoj garantius, ke en la landoj de la interkonsentintaj sindikatoj grandmezure kreskus la tendaro de la Esperanto-parolantoj, do plilarĝiĝus la multflanka utiligebleco de la lingvo.

Por ĉiu bona afero ni estas pretaj diskuti sur ĉiu nivelo de niaj internaciaj renkontiĝoj. La situacio, fakte, estas tia, ke granda plimulto de laboristoj, aktivuloj kaj ĝenerale de la popoloj neniam alproprigas lingvon de iu ajn alia nacio. Ankaŭ tio estas fakto, ke eĉ la sindikatestroj parolantaj unu aŭ du fremdajn lingvojn ofte bezonas interpretistojn, ĉar multaj el iliaj partneroj komprenas iun alian fremdan langvon."

Iniciatu UEA — ni ĝin subtenos

— Jen kies rekono kontribuis al tio, ke UEA en 1966 sin turnis al UNO kun internacia memorando aprobita el 74 landoj. Tiam, krom unu miliono da individuaj subskribintoj, inter ili multaj konataj politikistoj, scienculoj, artistoj, subtenis la memorandon la gvidantaro de 3843 diversaj sociaj organizoj en la nomo de sume 71 milionoj da membroj. Kvankam ne atinginte sian celon, la memorando tamen estis signifa, precipe ĉar ĝin subskribis 25 grandaj naciaj kaj internaciaj sindikataj centroj de socialismaj kaj kapitalismaj landoj kun preskaŭ 25 milionoj da membroj, aprobante, ke E-on, kiel UNO-konvencian internacian lingvon devige oni instruigu en ĉiuj lernejoj de la mondo kaj progresive ĝin enkonduku sur ĉiu kampo de la internaciaj interrilatoj. La plimulto de tiuj sindikatoj apartenas al la Internacia Ligo de Liberaj Sindikatoj. Ni opinias do, ke se laŭ hungara iniciato la Sindikata Mondligo farus decidon pozitivan, tiam oni povus komenci intertraktadon ankaŭ kun la Internacia Ligo de Liberaj Sindikatoj. Kiajn ŝancojn kamarado Gáspár vidas ĉi-koncerne?

S. G.: „Kompreneble, mi ĝojus, se en la Mondligo de Sindikatoj ni sukcesus en ĉi tiu demando kaj se la Mondligo de Sindikatoj povus pri ĝi sukcese intertrakti kun la Internacia Ligo de Liberaj Sindikatoj. Kelka

Jubilea Kongreso en Kopenhago

Ek de la unua universala kongreso de la internacia lingvo Esperanto en la jaro 1905 en Boulogne-sur-mer ĝis la 60-a pasis 70 eventoriĉaj jaroj. La jubilea kongreso estas rimarkinda de pluraj vidpunktoj. La nova estraro jam povis taksi la laboron faritan dum unu jaro kaj pruvi siajn kapablojn. Kaj la pasinta jaro ne estis tute facila. Lige al la novelektoj pasintjare en Hamburgo kreiiĝis ĉe certaj rondoj en la esperantista movado iu necerteco pri la sekvota vojo pro misinformoj, kaj ĉe aliaj bedaŭrinde, iu spirita stato konata nur el la tempoj de la „malvarma milito", kiam ĉio ajn neplaĉa al tiuj rondoj estis „komunisma" k. t. p. En iom tia atmosfero, ne tro efika sed tamen ekzista, kaj instigita kontraŭ la nova estraro de UEA, speciale pliintensigita antaŭ la kongreso, kiam oni en francaj kaj eĉ en danaj gazetoj kaj radio-dissendaĵoj asertis, ke UEA nun finfine plene komunistiĝis perdinte ĝian neŭtralecon k. t. p., en tiu post-hamburga klimato okazis la 60-a Universala Kongreso de Esperanto de 26. 7. — 2. 8. 1975 sub la honora patroneco de la dana ĉef-ministro Anker Jørgensen. Certe la kongreso estis tradicia. Sed ankaŭ certe la kongreso havis specialajn trajtojn, kiujn ni provu resumi kaj iom taksi.

(daŭrigo p. 14)

---

dialogo jam komenciĝis inter ĉi tiuj du grandaj internaciaj ligoj. Precipe por tio, ke la sindikatestroj en la kapitalismaj landoj pli kaj pli trovas necesa krei interrilatojn ankaŭ kun la sindikatoj de la socialismaj landoj. Ĉi tiun interproksimiĝon ni sincere salutas kaj, por la multflanka evoluigo de niaj interrilatoj, ni povus kunlabori ankaŭ en la larĝsfera disvastigo de Esperanto. Estus do dezirinde, ke ankaŭ la Mondligo de Sindikatoj kaj la Internacia Ligo de Liberaj Sindikatoj faru ĉi-koncerne interkonsenton. Tamen, mi pensas, ke antaŭe UEA povus iniciati ĉe la internaciaj sindikataj centroj, ke ili okupiĝu favore pri Esperanto. Kaj poste ni, hungaraj sindikatoj, pritraktinte la aferon ankaŭ kun la sindikatorganizaĵoj de aliaj landoj, povus akceli la sukceson de la iniciato. Depende de ĉi tio povus sekvi la unuecigo de la planoj kaj la difino de la praktikaj taskoj."

— *Mi opinias la vidpunkton de kamarado Gáspár tre reala. Fine permesu ankoraŭ mallongan demandon. La „Népszava", la ĵurnalo de la hungaraj sindikatoj, en sia numero de 12-a majo publikigis artikolon, kiu konstatis interalie, ke la ellerno de Esperanto povus esti utila kultura engaĝiĝo, ag-ofero por la anoj de la socialismaj laborbrigadoj. Kion vi opinias pri tio?*

S. G.: „Mi konsentas. Estas certe, ke anoj de socialismaj brigadoj, ellerninte Esperanton, jam per la lingvolernado pligrandigus sian kulturitecon kaj povus ligi amikajn, korespondajn rilatojn kun samfakaj brigadanoj de iu socialisma lando, lernantaj aŭ jam sciantaj Esperante. Per tio la internacia amikeco kaj la internaciismo fariĝus por ili kvazaŭ persona travivaĵo."

— *Ni dankas la grandsignifan deklaracion de kamarado Gáspár. Ni venigos ĝin al la naciaj kaj internaciaj asocioj de la E-movado kaj al ties ĉiuj gazetoj kaj radiodissendejoj, por ke ili utiligu ĝin en la intereso de la grandioza internaciisma afero ĉe la sindikataj centroj de sia propra lando kaj sur ties forumoj internaciaj.*

„Pluajn sukcesojn mi deziras al via fervora laboro por la disvastigo de Esperanto" *diris por fino Sándor Gáspár, ĉefsekretario de la Landa Konsilio de Sindikatoj.*

Imre Szenes

La nova estraro sub la prezidanteco de d-ro Humphrey Tonkin sincere klopodis iom eksperimenti. La monumenta inaŭguro, kiu, kvankam generale tre impresa, tamen estas same laciga, estis dupartigita. Antaŭtagmeze la reprezentantoj de eksterlandaj registaroj kaj internaciaj organizaĵoj salutis la kongreson kaj posttagmeze en aparta solenaĵo sekvis la landaj reprezentantoj. Tio estis bona solvo.

La malferma parolado de Tonkin estis konstruiva kaj klara.

„En la jaro 1905, kiam la unuaj parolantoj de Esperanto komencis la tradicion de la Universalaj Kongresoj, certe malmultaj antaŭvidis vicon de tiaj kongresoj, kiuj etendiĝos tra sepdeko da jaroj“, d-ro Tonkin komencis sian paroladon, daŭrigante: *„Multaj, ne konante la mankojn de la homa naturo kaj la komplikecon de la homa socio, supozis, ke la venko de la Internacia Lingvo venos preskaŭ tuj. Aliaj (kaj kun ili la multaj skeptikuloj kiuj defore rigardis tiun ĉi eksperimenton en internacia komunikado) supozis, ke Esperanto, kiel multaj aliaj bonaj ideoj, rapide kaj senspure malaperos.*

Malmultaj antaŭvidis la kreiĝon de forta socia movado kiu tenos viva tra la jaroj la ideon de la Internacia Lingvo. Malmultaj prognozis, ke tiu movado frontos tiom da problemoj, suferos tiom da renversoj, kaj submetiĝos al tiom da atencoj, sed restos fortika, firma kaj celkonscia. Tamen, tiel estis. Ni atingis nun nian sesdekan kongreson, ni pasis tra sepdek jaroj depost tiu unua kongreso en Boulogne. Nia Esperanto-kulturo enradikiĝis profunde en la korojn kaj vivojn de la parolantoj de nia lingvo, kaj ni hodiaŭ konsistigas unikan kaj profunde gravan internacian komunumon“.

Tonkin ankaŭ demandis pri la kaŭzoj de tiu sukceso kaj nomis diversajn, kiel ankaŭ ni (kp. p. 20) provetis iom pritrakti tiun temon. Grava ŝajnas la substreko de la UEA-prezidanto rilate al la akceptiĝo eventuala de internacia lingvo. *„Ke oni ne aŭtomate prenas la plej racian, plej logikan solvon“*. Ĝuste, ŝajnas, ke la nova estraro de UEA serioze familiariĝis kun tiu penso, kiu kontraŭas aŭtomatisman „venkon“ de Esperanto. Kaj tial oni serioze devas saluti la plivigliĝon aŭ la emon al plivigligo de la scienca esploro de la internacilingva fenomeno ĝenerale kaj speciale de Esperanto. La seriozaj seminarioj de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Probleme (CED) kaj la seminarioj al la ISU-prelegoj, ankaŭ novaĵo, tion substrekas.

La financa krizo, nuntempe reganta en la okcidentaj landoj kompreneble tuŝas UEA kaj, cetere, malbone influas ankaŭ la valuto-eblecojn de socialismaj landoj. Sciante, ke UEA 1974 havis grandegan financan deficiton, oni devas konfirmi al la nova estraro tre sukcesan agadon ĉidirekte ĝis nun. Oni antaŭvidas por 1976 ekvilibritajn financojn. Kun intereso oni ankaŭ eksciis, ke la agado de UEA ĉe UNO kaj UNESCO plue plivigliĝos. La fakto, ke la ĉeftemo de 60-a UK estis „La rolo de la virino en la socio“ klare montras la volon de la estraro, ne nur suniĝi sub la prestiĝa brilo de UNESCO, sed konkrete kontribui al la realigo de ĝiaj multflankaj valoraj planoj kaj programoj, nin ĉiujn — do ankaŭ la esperantistojn — koncernantajn. La sekvo estis, ke la Ĝenerala Direktoro de UNESCO, Amadou-Mahtar M'Bow sendis specialan mesaĝon. Tio estas unika en la historio de UEA. Substrekante, ke UNESCO bonvenigas ĉiujn konformajn al ĝia agadprogramo iniciatojn, la ĝenerala Direktoro skribis: *„Tial mi estas feliĉa, ke la organizantoj de la 60-a kongreso de Universala Esperanto-Asocio elektis kiel ĉefan temon de ĉi-tiu manifestacio la rolon de la virino en la socio. Per la kontribuo, kiun ili celas tiamaniere fari al la celebrado de Internacia Jaro de la Virino — proklamita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj — la esperantistoj povos daŭrigi sur esence grava kampo la laboron, kiun*

ili entreprenis por internacia kompreniĝo kaj interproksimiĝo de la popoloj.“

Kun aparta intereso oni ankaŭ notis la proponon de d-ro Tonkin, *„ke UEA kunvoku 1976 aŭ 1977 internacian konferencon pri la estonta vojo de la Esperanto-movado: ĝiaj formoj, prioritatoj, direktoj“* kaj due, ke UEA iniciatu *„la kreon de konsilantaro de eminentuloj el ĉiuj fakoj — grupo ĉefe sed ne ekskluzive esperantista — kiu helpu nin eldifini tiujn venontajn prioritatojn per kontribuo de siaj konsiloj kaj talentoj, kaj kiu malfermu al ni iagrade la vastan publikan mondon ekster nia sojlo“*.

Tre interesan diskuton en ĉi-tema senco sendube okazigis la novstila debato „La rolo de la individuo en la Esperanto-movado“, kiu okazis ĉe la grandaj rondaj tabloj en unu salono pri diversaj aspektoj kaj aktivecoj de la praktika movado. Tamen la malgranda sed treege vigla seminario „la ministeria studo de planlingvo antaŭ ĝia enkonduko“ havis multe pli altan nivelon kaj eble respondis iom al la direkto de la pensoj menciitaj supre.

Kiel dirite, rondoj troviĝantaj nun ekster la gvidorganoj de UEA (iam ĉefaj en ili) distrumpetas, ke UEA ne plu estas neŭtrala. Se jam estas sufiĉe malfacile, difini kio estas „neŭtrala“ tamen, oni ne povas observi iun ajn fakton, kiu pravigus tiujn aserttantojn. Tial la prezidanto de UEA substrekis, ke UEA daŭrigos la ĝisnunan vojon. *Kaj tio lau ni, estas sendube ebla, se internacia organizaĵo komprenas la dialektikon inter*

a) la specialaĵoj de la landaj asocioj, estimendaj, eluzendaj de la internacia organizaĵo, kaj

b) la internacia agadmaniero, specifika kaj ne tro ligebla al naciaj specifikaĵoj, sed estimenda kaj observenda de la landaj asocioj.

Sur la bazo de tiu duobla unueco entute nur eblas efika funkciado de internacia organizaĵo kiel tion pruvas UNO, UNESCO kaj centoj da aliaj internaciaj organizaĵoj kun multe pli da internacia pezo ol UEA, ekzemple kulturaj, sciencaj kaj multaj aliaj fakaj. Sed se internacia organizaĵo volas trudi siajn karakterizaĵojn al landa asocio, tio sendube ne servos al la komune realiginda celo, same ne, se landa asocio volas altrudi siajn specifikaĵojn al internacia organizaĵo aŭ aliaj landaj asocioj. Nur reciproka respekto ebligos harmonian kunlaboron entiu spirito, kia ĝi estis karakteriza por la konferenco de Helsinki.

La tuta kongreso elstaris pro trankvileco kaj tre kreiva kaj konstruiva atmosfero. El la multaj fakgrupoj, kiuj kunsidis, menciindas kiel novaj (pri la tradiciaj bv. kompari la pasintjarajn kongresraportojn en „der esperantist“) i. a. la du CED-seminarioj 1. „La estonto de CED“ kaj 2. kiel organizi la tutmondan interlingvistaron? Interlingvistiko kaj esperantologio: kiel ili interrilatas?

Kapablaj teoriistoj debatis vigle pri tiu grava problemaro. Grava estas ankaŭ la sukceso de Internacia Sciencista Asocio Esperantista (ISAE), kiu ek de 1976 eldonos la prestiĝan revuon „Scienca Mondo“, organo de la Demokratia Monda Asocio de Sciencistoj ankaŭ en Esperanto. La revuo aperos en Bulgario kaj riceveblos en GDR.

Ankaŭ ĉijare abundo da sciencaj prelegoj trovis siajn aŭskultantojn en la kadro de Internacia Somera Universitato: „Lingva situacio kaj lingva politiko en evoluantaj landoj“ de prof. d-ro Paul Neergaard, rektoro de la ĉi-jara Internacia Somera Universitato kaj afabla gastiganto, „Partopreno de la virinoj en la ekonomio“ (d-ro W. Bormann), „Virinoj kaj scienc-teknika progreso“ (B. Leonov), „Utopio kaj literaturo“ (d-ro H. Tonkin), „Edukado per komputiloj“ (B. kaj J. Sherwood), „La natura ekonomio de la maro“ (prof. d-ro C. Støp-Bowitz), „La scienco de la koloro“ (T. Kuwahara), „Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko“ (M. D. Goninaz). Al tiuj ISU-prelegoj aldoniĝis, ankaŭ novaĵo, serio da semina-

rioj nur malfermaj al pli malpli kompetentaj pri la problemo kongresanoj.

Kompreneble de speciala signifo estis la granda debato pri „la socia pozicio de la virino“, kiun partoprenis tre vigle ne nur virinoj el tre diversaj landoj kaj mondpartoj sed ankaŭ viroj, i. a. la prezidanto de CLR, Rudi Graetz, kiu akcentis, ke la konvencioj de UNO rilate al la samrajteco de la virino en GDR estas sisteme plenumitaj kaj daŭre plenumataj. Evidentiĝis dum la diskuto tre klare, ke la pozicio de la virino forte dependas de la konkretaj socipolitikaj faktoroj kaj kondiĉoj. Estis akceptita koncerna kongresa rezolucio (vidu sube).

De speciala signifo estis la bone vizitita MEM-kunveno, kiu, aŭskultinte la raporton de sia prezidanto N. Aleksiev, diskutis multajn problemojn lige al la diversmetoda kaj diversideologia pacbatalo, speciale ankaŭ rilate al la traktadoj de la 35-ŝtata konferenco de Helsinki. La kunveno sendis al tiu historia konferenco aproban saluttelegramon.

La mondhistoria graveco de la konferenco pri sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo, kies rezultoj nur estis publikigitaj post la fino de la Universala Kongreso, ŝajne ankoraŭ ne estas sufiĉe aprezita flanke de UEA. Nur tiel oni povas al si klarigi la fakton, ke la prezidanto de UEA ĝin eĉ ne tuŝis en sia malferma parolado. Certe, la komitato de UEA sendis propono-rezolucion al la konferenco (vidu sube), sed ĉu oni vere sukcesos vidi en tiu giganta konferenco de la paca kunekzistado nur el pure lingvo-komunikada vidpunkto ion intersan por la esperanto-movado?

Restas mencii, ke ankaŭ ĉi-kongrese estis prezentita riĉa kultura programo, i. a. kun la tradicia Internacia Arta Vespero, Dana Vespero, Teatraj Vesperoj k. t. p., en kies kadro la Bulgara Esperanto-Teatro sub la gvido de Kiril Draĵev prezentis „La Servisto de du Mastroj“ de Carlo Goldoni. En la filmprogramo i. a. ankaŭ troviĝis la GDR-filmo „Hieraŭ ni ankoraŭ estis infanoj“.

Entute la kongreso do estis sukcesa, tradicia, sed kun novaj akcentoj. Speciala danko ŝuldiĝas al la sindona agado de la danaj organizantoj, kiuj sukcesis realigi modelan organizadon.

D. Blanke

REZOLUCIO DE LA MEM-KUNVENO

Al la Eŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro en Helsinki

La esperantistoj ĉeestintaj la publikan kunvenon de Mondpaca Esperantista Movado, venintaj el pli ol 40 landoj de la mondo al la 60-a jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, esprimas sian sinceran apogon al la laboro de la konferenco kaj profunde esperas, ke surbaze de la decidoj de la registaroj en Helsinki la homaro atingos pli rapide sian noblan celon: daŭra paco, sekureco, kunlaborado kaj amikeco.

La esperantistaro speciale agadas ankaŭ por forigo de la lingvaj barieroj inter la popoloj per la helpo de la Internacia Lingvo. Ni arde subtenas la solvon de la interŝtataj disputproblemoj per pacaj rimedoj, por eviti la militajn konliktojn en la intereso de la homa civilizo kaj progreso.
Kopenhago, 28. julio 1975

Al la Konferenco pri Europa Sekureco

La komitato de Universala Esperanto-Asocio, supera gvida instanco de la organizaĵo, kunveninta en Kopenhago dum la 60a Universala Kongreso de Esperanto, kun plena intereso kaj apogo atentante la laboron de la Eŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro,

Konstatinte

1. ke la ĉiam kreskanta problemo de multlingveco grave bremsas la liberiĝon kaj plivastiĝon de la kunlaboro celata de la Konferenco, kiel evidentiĝas eĉ per la komplikaĵoj prepari identajn tekstojn de la Konferenca rezolucio en ses lingvoj;

2. ke la problemo de multlingveco aparte akre aperas en la kampo de personaj kaj neoficialaj rilatoj, kies signifon speciale atentas la Konferenco;

3. ke justa, egalrajtiga kaj adekvata solvo de ĉi tiu problemo povas troviĝi nur en ĝenerala adopto de internacia planlingvo, kiel jam dum jardekoj pruvis la ĉiukampa funkciado de la internacia lingvo Esperanto; **prenante en konsideron** la samteman rezolucion akceptitan dum la 58a Universala Kongreso de Esperanto en Beograd, 1973;

Proponas

ke la komitato de registaraj ekspertoj, kiuj kontrolos la realigadon de la konferencaj decidoj, pozitive konsideru la jam entreprenitajn paŝojn por apliki Esperanton en sociaj, politikaj kaj sciencaj medioj (parlamentoj, partioj, sindikatoj, universitatoj) kaj helpu al plejeble vasta antaŭenigo de tiuj klopodoj.

Internacia Jaro de Virino

„La 60a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazas en Kopenhago de 26 julio ĝis 2 aŭgusto 1975, diskutinte la socian pozicion de la virino sub la ĝenerala temo „La Virino“

notas kun aprobo la agadon de Unuiĝintaj Nacioj kaj ties specialigitaj organizaĵoj por plifortigi la rajton kaj pozicion de la virino,

konstatas ke malhelpoj al egalrajteco en la diversaj landoj estas ofte sociaj kaj kulturaj, do ne nur juraj malhelpoj,

alvokas al ĉiuj partoj de la esperantomovado studi tiun ĉi problemon kaj entrepreni paŝojn por akceli la atingon de egalrajteco jura, socia kaj kultura, kaj antaŭenigi la rolon de la virino en la gvidado de la esperanto-movado,

kaj **atentigas** pri la avantaĝoj de la Internacia Lingvo Esperanto kiel perilo de konstrua diskutado pri tiu kaj aliaj sociaj kaj kulturaj demandoj.“

31. Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Fredericia/Danlando

En tiu-ĉi jaro la kongreso okazis de 19.—26. 7. 1975 an Fredericia/Danlando. Fredericia estas malgranda bela kaj tre pura urbo, kiu troviĝas en la mezo de la lando sur la insulo Jütland.

Partoprenis la kongreson ĉirkaŭ 270 junaj esperantistoj el 14 landoj. El GDR ĉeestis Jürgen Hamann (Leipzig) kaj Rita Krips (Berlin). La ĝenerala temo de la i. j. k. estis „kultura interŝanĝo", kiun ankaŭ Jürgen Hamann pritraktis. Rita Krips inter alie partoprenis la KER-seminarion (KER = komisiono por Eksteraj Rilatoj), kie ŝi diskutis kun la aliaj partoprenantoj la temon „Lingvo kaj malkoloniigo". Tiun-ĉi seminarion ankaŭ ĉeestis reprezentantoj de neesperantistaj organizaĵoj. Aliaj subtemoj de la kongreso estis: la dan-germana minoritatoproblemo — ĉu modelo por Eŭropo?, neagrabla temo: „vivon pro vivo — mortopuno", „por pli efika interŝanĝo: Japanujo — ne tiel, sed tiel ĉi!", „socia organizado kaj kulturinterŝanĝo", „studrondo pri edukadaj sistemoj en diversaj landoj", „kultura interŝanĝo inter evoluintaj landoj kaj landoj en evoluo", „laborgrupo por komencantoj", „seminarieto por gvidantoj", „diskuto pri la nova statuto de TEJO", „kantoj kaj popoldancoj skandinaviaj". Okazis ankaŭ kelkaj prelegoj: „Principa analizo de la lingvopolitika situacio en la mondo", „la Feroaj Insuloj", „Hindujo", „japanaj literaturo kaj filozofio" kaj „la fenomeno de la Esperanto-kulturo" (de d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA).

Dum la konferenco preskaŭ ĉiuvespere kunsidis la komitato de TEJO, kio pritraktis la diversajn problemojn de la TEJO-agado kaj la estontan rilaton de TEJO al UEA. Finfine estis elektita nova TEJO-estraro de la komitato de TEJO.

Jen la nova estraro:

prezidanto (aŭ pli ĝuste prezidantino): Claude Nourmont, Francio
vicprezidantoj: Savas Tsiturides, Grekio
Klaus Schubert, FR Germanio
ĝenerala sekretario: Bruneto Kasini, Italio
helpsekretario: Julke Emmelkamp, Nederlando
kasisto: Paul Peeraerts, Belgio
membroj: Juan Azcuenaga, Hispanio
Stefan Mac Gill, Novzelando
Margarita Najera, Meksiko
Angel Todorov, Bulgario

Dum la libera tempo oni povis veturi aŭtobuse aŭ marŝi al la bela urbcentro aŭ vespere partopreni la diversajn aranĝojn. Okazis renkontiĝa vespero, vespero de malmulte konataj kulturoj kaj aliaj festoj. Oni povis viziti danan familion, rigardi prezentadon de gimnastika grupo kaj de dana popoldancgrupo aŭ promeni tra la urbo. Je la lasta tago estis organizita aŭtobusa ekskurso al Fueno.

La loka gazeto ĉiutage raportis pri la kongreso — la unuan tagon eĉ en esperanto bonvenigis la partoprenantojn.

La plej granda surprizo estis la naskiĝo de unu „esperanto-infano". La gepatroj — danaj esperantistoj — estis du el la helpantoj de la kongreson organizintaj gejunuloj. Por gratuli kaj transdoni antaŭe kolektitan sumon ea mono unu el ĉiu lando povis veturi peraŭtobuse al la hospitalo. Tiu-ĉi internacia grupo kaŭzi grandan sensacion en la hospitalo.

Junulara laboro pliviglîgis

Rita Krips, 22 jara, studentino de eksterlanda komerco, la nova prezidantino de la Junulara Komisiono

Ĉi-jare observeblas simptomoj en nia agado certe optimismigaj. Jen kaj jen montriĝas junaj aktivuloj, okazas junulaj renkontiĝoj kaj simile. Certe, ankoraŭ multo estas farenda ĝis kiam ni povas paroli pri bone organizita junulara esperanto-movado en nia lando. Sed pli kaj pli la diversebenaj gvidantaroj ekkomprenas, ke temas pri ĉefpunkto de nia, de ilia esperantista agado. Se ni ne **nun** sisteme kaj energie evoluigas nian junularon esperantistan tiam **post mallonga tempo** mankos al ni la posteularo. Simpla kalkulo, tamen bedaŭrinde ne ĉiam farita. Jam 1974 en Berlin dum la tria tutrespublika renkontiĝo de la esperantistoj de GDR (kp. „d. e." 65/66) la diskuto pri nia junulara laboro bone komenciĝis. Dum CLR-kunsidoj ĝi ek de tiam regule estis sur la tagordo. Januare 1975 40-persona tutrespublika seminario, dum semajnfino traktis esencon, staton, estonton kaj metodojn de la junulara agado, kaj konatigis la staton de la tutmonda junulara esperanto-movado.

Distriktaj laborondoj organizis junularajn aktivojn kaj aranĝojn. Laŭdinda estas la faro de DLR Dresden. Oni senprobleme kooptis 5 gejunulojn en la estraron. Oni regule organizas renkontiĝojn, veturas eksterlandon. Ankaŭ en la DLR Suhl, Erfurt kaj Potsdam oni sisteme klopodas pri plijuniĝo. Eĉ kontrakto pri kunlaboro kun la estraro de Libera Germana Junularo en Hildburghausen ekzistas. Certe, ne tuj venas sukcesoj. Kaj unuaj sukcesoj ne nepre restas ĉiam stabilaj. Dum finfine aranĝita kunsido de la Junulara Komisiono (Junulara Sekcio) de Centra Laborrondo Esperanto 28. 6. 1975 en Berlin 30 gejunuloj el la tuta respubliko renkontiĝis por novformi la jam terure troaĝiĝintan Junularan Komisionon.

Elektiĝis 26 kapa komisiono kiu estonte gvidos la junularan aktivadon. Al tiu komisiono pro ofico apartenas ĉiuj junularaj reprezentantoj de la

(daŭrigo p. 20)

Resume la kongreso estis sufiĉe interesa kaj sukcesa. Kiel rezulto oni voĉdonis por la rezolucio, ellaborita de la rezolucia komisiono, al kiu ankaŭ Jürgen Hamann apartenis.

Restas nur mencii, ke la kongreso ankoraŭ ricevis du aliajn titolojn: unue „la malsatkongreso" (pro la manko de sufiĉe multe da manĝaĵo) kaj due „la matrackongreso" (ĉar la partoprenantoj devis dormi sur matracoj kuŝantaj rekte sur la plankoj de lernejo). Dum la kongreso estis konfirmita, ke la sekvonta okazos 1976 en Saloniki/Grekujo. *Rita Krips*

Detlev Blanke

Kial venkis Esperanto?

Tio estas la titolo de tre fama broŝuro de prof. L. Ĵirkov eldonita de EKRELO (Leipzig) en la jaro 1931. Parte kun Ĵirkov oni povas argumenti, ke Esperanto venkis en tiu senco, ke ĝi transvivis diversajn malfacilajn historiajn etapojn (Ĵirkov-speciale traktas la Ido-krizon) kaj malgraŭ la ekzisto de teorie en detaloj eble eĉ pli perfektaj planlingvaj projektoj, Esperanto estas tra la jardekoj ĝis hodiaŭ fakte la sola pli vaste praktike uzata planlingvo (ne projekto, de kiuj ekzistas centoj). Tial ne estas superflue demandi sin, kiuj faktoroj do influis, ke ĝuste Esperanto kaj nur Esperanto „venkis", aŭ ni diru pli bone: fariĝis praktika socia fenomeno neniel ignorebla, fenomeno altiranta pli kaj pli la intereson de politikaj (kp. paĝojn 8 sekv.) kaj sciencistaj rondoj.

La kaŭzoj de la sukceso de Esperanto certe estas a) *lingvo-strukturaj,* do lingvoscience klarigendaj kaj b) *eksterlingvaj, socifaktoraj.*

Ni citu kelkajn *lingvo-strukturajn* kaŭzojn.

L. Zamenhof konstruis Esperanton laŭ praktikaj funkciismaj vidpunktoj ne tro zorgante etimologiajn (kiuj ĉefas ĉe la naturalismaj projektoj). Lia lingvo tial povis rezigni je multe da balasto historie kreskinta. Tial oni povas citi i. a. jenajn ĉefajn karakterizaĵojn:

DLR-oj kaj krome kelkaj aliaj aktivaj gejunuloj. La komisiono estas preskaŭ plene virina, ĉu pro la Internacia Jaro de la Virino?

Kiel gvidantaro de la junulara Komisiono elektiĝis

Rita Krips (Berlin/Potsdam), prezidantino
Renate Schütt (Dresden), vicprezidantino
Marita Dörner (Meißen), membro
Gabriele Müller (Berlin), membro
Ingrid Erfurt (Berlin), membro
Michael Lennartz (Ludwigsfelde), membro.

Al la komisiono kaj ties gvidantaro ni deziras plenan sukceson. Ili ĉiam povos kalkuli je la helpo de CLR. Kompreneble post iom da tempo oni vidos, ĉu la gvidantaro estos en la nuna konsisto laborema, laborkapabla kaj laboranta kaj ĉu eventuale kooptoj estos dezirindaj.

Fine ni ne forgesu danki al la „eksjunuloj", la iamaj fondintoj kaj aktivaj membroj de la JK, i. a. d-ro Hans Eichhorn, (prezidinto kaj vicprecidinto de TEJO), Rudolf Burmeister, Linde Knöschke, Dietrich Meusel, Winfried Röhricht, Jürgen Hamann, Ingrid Schödl kaj multaj aliaj.

Ĝis renkontiĝo komence de 1976 denove en la belega kaj luksa seminaria kaj ripoza domo de Kulturligo en Bad Saarow. D. B.

1. La lingvo (ankoraŭ kiel projekto) ne estis prezentita kiel jam kompleta lingvo (kiel ekz. klopodis Alfandari kun sia Neo, kiu tuj disponis pri dikega vortaro), sed kiel ĝermo kolektive evoluigenda. Tamen substrekindas la mirinda kompleteco de la ĉefaj strukturoj, kiuj nur devis esti provizitaj per karno flanke de la uzantoj.

   Do Esperanto estis konceptita kiel aŭtonoma, sendependa de aliaj lingvoj malferma sistemo, kiu ne evoluu laŭ la arbitraj imagoj de unuopulo (kiel tion postulis Schleyer por sia Volapük) sed laŭ la efektivaj bezonoj de la multiĝantaj uzantoj.

2. La vortkrea, morfologia, fonema kaj sintaksa sistemoj de la lingvoj estas regulaj, kio estas tre grava por la lernado kaj uzado de la lingvo.

3. Tiuj sistemoj, kvankam regulaj kaj do validaj por la tuta lingvoj, kaj ĉiuj kreiĝantaj novaj eroj (ekz. kunmetitaj vortoj, frazoj k. t. p.), tamen ne estas tute logikaj. Tio estas grava por la elasteco de la lingvo. Plena logikeco (afero rilatanta al pensado) nek estas realigebla nek realiginda en homa lingvo (afero rilatanta ne nur al pensado sed ankaŭ al sentado, komunikado k. s.).

4. La kombino de aŭtonoma vortkreado laŭ fiksitaj reguloj kaj la principo de transpreno de internaciaj vortoj (en bloko) ebligas adaptigon de la vorttrezoro al la bezonoj de la komunikado nek atingebla de la naturalismaj projektoj nek de iuj eĉ pli „logikaj“ sistemoj.

5. La elekto de la vortradikoj speciale el romanidaj linvoj, cetere agnoskita principo en la historia interlingvistiko, respondas al la disvastigeco kaj internacia signifo, historie kreskinta, de tiuj lingvoj. Tamen ne regas iu eliteca eŭropocentrismo kiel ĉe la naturalismaj sistemoj.

6. La fonologia/fonetika simpleco de la lingvo, do la vastaj toleroj de la fonemoj, ebligas bonan komprenon eĉ ĉe sufiĉe forta parola influo de la gepatra lingvo (alta redundanco).

Certe oni povus aldoni pliajn gravajn karakterizaĵojn.

Nepre oni tamen komprenu, ke lingvo unuavice estas **socia fenomeno,** ligita al la socio kaj ties evoluo. Tial, kaj tion ne komprenas la multaj projektoj-fabrikantoj, decidaj por sukceso de iu lingvo ne nepre estas ties lingvo-strukturaj kvalitoj, kvankam ili havas gravan influon.

Optimume uzeblajn kaj sufiĉe akcepteblajn lingvajn kvalitojn ankaŭ havas aliaj planlingvaj projektoj, kaj ili tamen havis neniun aŭ preskaŭ neniun sukceson.

Tial ni devas mencii kiel kaŭzojn por la sukceso de Esperanto ankaŭ *sociajn do nelingvostrukturajn, eksterlingvajn faktorojn.*

Inter ili menciindas certe la jenaj, principe lingvopolitikaj konsideroj:

1. La objektiva bezono al faciligita internacia komunikado flanke de la kapitalismo en Eŭropo fine de la 19a, komence de la 20a jarcento, certe bonvenigis la ideon de internacia lingvo. La malsukceso de Volapük ne povis disbati la ideon. Sed tiu situacio principe validas por ĉiu-ajn pli malpli bone konstruita lingvo, do ne nur por Esperanto. Kaj konstrui lingvoprojekton estas multe pli facile ol ĝin enpraktikigi.

2. Zamenhof, diference al Schleyer, al la Ido-kreantoj kaj al la adeptoj de la naturalisma skolo, bone komprenis la socian karakteron de la fenomeno lingvo.

   Tial li subtenis ĉiujn kolektivajn influojn je la lingvo kaj kontraŭstaris papecajn individue arbitrajn.

3. Intuitive kompreninte la problemon de la normo kaj de la diakronio (historia ebeno) en lingvo, li klopodis iniciati la kodigon, fiksigon kaj precipe la evoluigon de la lingvo per tre postulemaj tradukoj kaj originalaj kreaĵoj. La ekzisto de tiu modelliteraturo, poste pli kaj pli kolektive kreita kaj kreata kaj la fiksigo (kodigo) de la „Fundamento de Esperanto" kiel netuŝebla sistemdokumento (Systemurkunde) estis de eksterordinara graveco por la evoluo (diakronio) de samtempe pli kaj pli stabiliĝanta kaj fiksiĝanta lingvo (sinkronia aspekto).

   Tiun gravan problemon ĝis hodiaŭ komprenis nek la Idistoj nek la naturalistoj, kiuj ambaŭ kredis (ankoraŭ?) literaturon superflua, kaj se ili eventuale iom komprenis, jam estas tro malfrue returni la radon de la historio. Se la idistoj tuj estis komprenintaj tiujn kaj la sekve menciotajn vidpunktojn, Ido povintus fariĝi eĉ multe pli serioza konkurinto de Esperanto ol ĝi estis.

4. Esperanto estis rigardita de la adeptoj kiel praktika instrumento tuj uzenda. Oni do ne arbitre, teorie „pliperfektigis" la lingvon (kiel ĉe Ido) sed utiligis ĝin praktike, fidante al la (feliĉe bonaj) kvalitoj de la lingvo. La movado ĝuste komprenis, ke nur la praktiko evoluigos, „pliperfektigos" la lingvon.

5. Gravan socian funkcion ankaŭ ludis la humanisma (kvankam grandparte, utopiisma) koncepto de Zamenhof, nome pacigi la mondon per unu komuna lingvo, interfragiti la homojn. Kiel ajn forte kiel nescienca oni devas kritiki tiun „internan ideon", oni devas agnoski, ke la idea kunligiteco de la multaj unuaj esperantistoj al tiu „interna ideo" estis de grava stabiliga efiko. Kreiĝis la lingvoportanto („rondo familia"), antaŭkondiĉo por la uzateco kaj sekve de la evoluo de la lingvo. Hodiaŭ multe pli fortaj idealoj ol la „interna ideo" respondantaj pli bone al la reala mondo (ekz. proleta internaciismo, porpacaj idealoj nutrataj de ekkono de la veraj kaŭzoj de la mondaj problemoj) fariĝis la kunligilo inter multaj adeptoj de Esperanto, kaj cetere, ne laste, entute la idealo de internacia lingvo.

Jen kelkaj konsideroj, certe ne kompletaj kaj eble parte diskutindaj, kiuj meritas mencion, se oni serĉas la respondon je la demando „Kial venkis Esperanto"?

Scienca prelego en universitato

La sekciestro por Esperanto en Kulturligo de GDR prelegis la 16. 5. 1975 antaŭ 20 doktoriĝontaj asistantoj en la lingvistikaj sekcioj de la Humboldt-Universitato de Berlin pri la temo „Pri la problemo de planlingvoj, sub speciala konsidero de Esperanto". Jam semajnojn antaŭe disdonitaj tezoj estis bona preparo por la diskuto. La asistantoj, venantaj ne nur el GDR sed ankaŭ el Jugoslavio, Bulgario, Hungario kaj ĈSSR vigle diskutis kaj montris sin tre impresitaj pro la seriozaj sciencaj aspektoj de Esperanto, al ili plene nekonataj.

Violin Oljanov, Sofio

Metodikaj demandoj de la instruado de Esperanto I

La konata bulgara gvidanto de multaj esperanto-kursoj kaj prezidanto de la Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj, Violin Oljanov, prezentis en „Bulgara Esperantisto" n-roj 10—12/1974 kaj 1—2/1975 serion da artikoloj pri la supre menciita temo. Ni represas ilin, iom koncizigitaj, en la sekvantaj numeroj de „der esperantist", ĉar ili enhavas multe da valoraj spertoj nepre utiligendaj ankaŭ en la esperanto-kursoj de GDR. Eble ni sukcesos per la publikigo de tiu serio stimuli diskuton pri la plibonigo de la instrua nivelo de niaj kursoj. Ni volonte malfermos la paĝojn de nia revueto al tia diskuto. *La redakcio*

1. Enkonduke

. . . Estas konata fakto, ke la societoj ĉiam strebas al amasa malfermo de komencaj kursoj kaj subtaksas la daŭrigajn. La malfermo de tiaj kursoj estas preskaŭ esceptoj. Tiu fakto havas du konsekvencojn: granda parto de la finintaj la elementan kurson perdiĝas kaj ne revenas plu al la Movado, alia parto restas „eterne novaj esperantistoj".

Grava kaŭzo pri tiu stato estas la manko de bonaj Esperanto-instruistoj, flamantaj en sia laboro, spertaj Esperanto-lingvistoj, kapablaj edukistoj kaj metodikistoj. . . .

La unua postulo al la instruisto estas bone regi la lingvon. Li devas havi aŭtoritaton antaŭ la lernantoj, sed li ĝin ne havos, se la lernantoj rimarkus (kaj ili nepre rimarkus!), ke li hezitas en siaj scioj. Sed la pli grava kaŭzo por tiu postulo estas, ke se la kono de la lingvo ne estus sufiĉa, la instruisto ne povus bone prezenti la materialon al la lernantoj, ne povus koncentrigi sian atenton al la metodo, al la maniero de instruado.

La problemo de la instruado, de ĝia organizo, de la preparo de Esperanto-instruistoj estas multaj. Sed ne ties analizo estas la tasko de ĉi tiuj miaj notoj. Evidente estas tempo apartigi pli grandan atenton al tiu unuaranga problemo de nia Movado.

Nun, ĉe la ekzistanta stato, mia tasko estas konigi mian instruistan sperton kaj atentigi pri iuj praktikaj problemoj de la E-instruado por helpi al la novaj kolegoj kun ne granda sperto kaj tiumaniere kontribui al la plibonigo de la instrulaboro.

2. La metodo dependas de la celo

Metodo de la instruado estas la maniero, la procedaro, per kiu oni prezentas la materialon. Oni ne povas doni unu fojon por ĉiam la plej trafan metodon por atingo de maksimuma rezulto. La metodo dependas de multaj faktoroj, unua inter kiuj estas la starigita celo: ĉu la kurso estas ordinara praktika, ĉu por instruistoj, ĉu por tradukistoj, ĉu rapidega praktika kurso pro antaŭstaranta veturado eksterlanden ktp. Ne povas esti egalaj ankaŭ la metodoj de diversgradaj kursoj — komencaj, daŭrigaj, perfektigaj, seminarioj, k. a. Tre grava estas ankaŭ la nivelo de la aŭditorio: instruiteco, kultura nivelo, lingva kulturo, aĝo, nombro de la partoprenantoj ktp. Eĉ la aŭditorio en rekta senco, t. e. la kursejo povas influi al la metodo: ĉu ĝi estas universitata aŭditorio, ĉu klasĉambro en elementa lernejo, ĉu halo en juĝejo aŭ en politika klubejo.

Sed la metodo antaŭ ĉio dependas de la lektoro mem, de la sperto, kulturo, karaktero, klereco, lingva kulturo. Ne sufiĉe kompetenta lektoro, ne reganta bone la lingvon ne povus gvidi kurson ekzemple laŭ konversacia metodo, sen lernolibro, ĉar li bezonus ĉiam ian apogilon.

Oni ĉiam devas konsideri ankaŭ la okupatecon de la homoj. En la nuna tempo oni ordinare estas tre okupataj en profesia laboro kaj socia aktivado. Pro tio oni devas tiel instrui, ke la kursanoj lernu la novan materialon grandparte en la klaso; por la hejmo restu nur la neceso ripeti.

3. Kiel komenci?

La komenco estas unu el la plej gravaj momentoj de la kurso. La sukcesa komenco certigas almenaŭ je 50 % la sukceson de la tuta kurso. Kompreneble, oni (ĉu la lektoro, ĉu iu el la organizantoj) devas fari enkondukan paroladon. Oni ne konsideru, ke ĉiuj kursanoj estas anticipe konvinkitaj pri la utileco de Esperanto. Ĉe multaj ekzistas ankoraŭ dubo, hezito, ĉu vane ili ne perdos la tempon. La enkonduka parolado havas la celon daŭrigi la antaŭan propagandan kaj agitan laboron, ĝi devas definitive gajni la aŭskultantojn por nia afero, entuziasmigi, ardigi ilin. Tiu momento estas tre grava por la plua sukceso de la kurso.

Poste la lektoro klarigas la bazajn principojn de la metodo, kiun li sekvos. Tio estas necesa por fari la kursanojn siaj helpantoj, por ke la instruprocedo iru sen obstakloj. Post tiuj necesaj enkondukaj klarigoj la lektoro povas jam trankvile kaj laŭplane gvidi la kursanojn en la mirindan regnon de la lingvo.

Estas tre grave, ke la kursanoj ne sentu la lecionojn, kaj precipe la unuan, kiel ion tute novan. Kontraŭe: ili vidu en la lecionoj ion konatan. En la komenco mem tion ni atingas per la internaciaj vortoj, kiuj en Esperanto sonas tute same, aŭ preskaŭ same kiel ankaŭ en la gepatra. Tiaj vortoj estas ekzemple: studento, generalo, poeto, vino, kapitano, artisto, telefono, aparato, aeroplano, dokumento, motoro, sezono, romano, portreto, ktp. ktp.

La unua parto de tiuj vortoj ne devas havi ian ajn komplikaĵon aŭ dubon. Post la unua paŝo ni povas fari la duan: prezenti samspecajn internaciajn vortojn kun akcento diferenca de la gepatra kaj fine — kun specifaj literoj (supersignitaj aŭ kun prononco diferenca de la prononco en la eŭropaj ĉeflingvoj). Tiaj vortoj estas ekzemple: geografio, nacio, profesoro, muziko, matematiko, logiko, poŝto, ĉokolado ktp. Tiumaniere la aŭskultantoj klare eksentas la regulon pri la akcento kaj la specifajn Esperantoliterojn, kiujn la lektoro devas emfazi. Do, la formuligo de la regulo estiĝas superflua, kiel ankaŭ en la plimulto de okazoj — la instruo de la alfabeto. Per tio ni atingas kelkajn celojn. Ni kompletigas la efikon de la enkonduka parolado, montrante la facilecon de Esperanto. La kursanoj tuj ekkomprenas la novan lingvon. Ili facile legas la novajn vortojn kaj tiamaniere ekkonas la Esperantan literaron. Ili ekkutimas al regula akcentado kaj prononcado. Jam en la komenco mem ni malkovras la gravan regulon de la Zamenhofa gramatiko, ke ĉiuj internaciaj vortoj eniras en Esperanton.

Tiuj internaciaj kaj konataj al la kursanoj vortoj prezentas sufiĉan fonduson por alpaŝo al la unuaj frazoj:

Smirnenski estas poeto. Zaimov estas generalo. Telefono estas aparato. Pasporto estas dokumento.

Tie ĉi ni agas laŭ la formulo:

$$a + x = b$$

En la frazo *a* estas *Smirnenski* (konata al la kursanoj); *b* estas *poeto*

Kelkaj informoj pri la atingoj de la esperantistoj en Germana Demokratia Respubliko 1965—1975

1. Enkonduke

Pro la speciala internacipolitika situacio, en kiu troviĝis GDR, organizo de oficiala esperanto-movado nur okazis relative malfrue. La fakto, ke GDR nur komence de la 70aj jaroj ekhavis plenajn diplomatiajn rilatojn kun la granda plimulto de la ŝtatoj de la mondo efikis malrapidige je la elformiĝo kaj eklaborado de efika esperanto-movado.
1965 fondiĝis en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko grupoj kaj gvidantaroj de la esperantistoj de GDR Kion ni atingis ĝis nun?

2. Kio estas Kulturligo de GDR?

La 1945 fondita Kulturligo de GDR (KL) estas kultura organzaĵo de GDR aktivanta precipe en medioj de la scienca kaj kultura intelektularo de GDR. Ĝia celo estas per kultura, multflanka agado (literaturo, arto, muziko, fotografio, naturagado, filatelo kaj diversaj aliaj kampoj de la personaj interesiĝoj) helpi al la evoluo de spiritoriĉaj socialismaj personecoj kaj kontentigi la multflankajn kulturajn interesojn de la civitanoj. KL apartenas al la mandatohavaj sociaj organizaĵoj kaj estas reprezentata en la popola parlamento kaj en la distriktaj kaj subdistriktaj parlamentoj, kio certigas certan amasan influon kaj socian prestiĝon.
Kulturligo agadas en 6 fakaj sekcioj, kiuj estas plene samrajtaj kaj samstatusaj, kvankam kun tre diferenca membronombro:

1. Arto kaj literaturo (muziko, filmado, teatro k. t. p.)
2. Naturamikoj (kun 20 subsekcioj, i. a. arkeologoj, turistoj, astronomoj, botanikistoj, numismatikistoj)
3. Fotoamatoroj
4. Filatelistoj
5. Scienco kaj intelektulaj kluboj
6. Esperantistoj

Ĉiuj tiuj 6 sekcioj estas reprezentitaj sur ĉiuj gvidebenoj de Kulturligo, havantaj ofican kaj honorofican aparaton kaj la necesajn materiajn rimedojn.

3. Esperantistoj en Kulturligo

La „Esperantistaro en KL de GDR“ estas la oficiala (kaj entute la sola) organizita esperanto-movado en GDR. Ĝi formas memstaran organizan kaj fakan unuon en KL kaj laboras kun siaj propraj gvidantaroj. Tamen, kiel por ĉiuj 6 faksekcioj entute, ankaŭ por la esperantistoj validas la statuto de Kulturligo, ties membrokartoj, rajtoj kaj devoj.

(konata); *x* — ne konata (la verbo *estas*), kiun oni facile povas trovi laŭ senco.
Tiun ĉi formulon ni devas utiligi en la tuta kurso, ĉar ĝi ebligas la eviton de tradukado, kio estas tre grava por la bona adopto de la instruita materilo, por alta sukceso. Pri tio ni parolos poste.
Iom post iom ni transiras al la demandoj kun *ĉu, kio, kiu, kia* ktp.
Do, ni konstatas, ke la maŝino jam funkcias sen bremsoj, la kursanoj nin komprenas eĉ sen uzo de la gepatra lingvo. Ili ankaŭ ĝojas, ke jam en la unua leciono ili ĉion komprenas sen traduko, kio krom pedagogia signifo havas ankaŭ bonan psikologian efikon. *(Daŭrigota)*

Ĉiuj esperantisto de GDR, volanta organizite aktivi per kaj por Esperanto estas membro de KL, pagas kotizon kaj ricevas membrodokumenton.
La plej alta honorofica gvidinstanco estas „Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR“ (CLEK), konsistanta el prezidanto, vicprezidantoj, sekretario kaj membroj (nuntempe 34 membroj). CLEK estas komparebla kun „ĉefestraro, Centra Komitato, Landa Komitato k. t. p. en aliaj landoj. „Laboraktivo“ (8 membroj) kompareblas kun prezidantaro.
Sur distrikta ebeno funkcias Distrikta Laborrondo Esperanto en KL de GDR (DLEK) kaj sur subdistrikta ebeno Subdistrikta Laborrondo Esperanto en KL de GDR (SLEK), kiu gvidas la unuopajn grupojn. La gvida piramido estas CLEK → DLEK → SLEK → grupo → membro kaj returne (laŭ respondeco kaj elektoj). Samtempe ekzistas sur loka, subdistrikta, distrikta kaj respublika ebenoj paralelaj ligoj al la kompleksaj (la 6 sekciojn ampleksantajn) estraroj de tuta Kulturligo.
CLEK havas oficialan oficejon en Berlin kun 3 tuttage pagataj laborantoj. Sur distrikta kaj subdistrikta ebenoj ekzistas ankaŭ profesiaj oficejoj de KL, kiuj ankaŭ subtenas kaj kunrealigas la agadon de la esperantistoj. CLEK havas buĝeton, simile ankaŭ la aliaj subordigitaj unuoj.
Seminarioj, laborkunsidoj de CLEK, DLEK kaj SLEK k. t. p. estas senpagaj.
Nuntempe estas organizitaj 1100 esperantistoj en 92 grupoj de KL de GDR. Pro troaĝiĝo de la membraro la membronombro falis (pro mortoj) kaj nun stagnas, sed la membraro interne ŝanĝiĝas laŭ aĝo (plijuniĝas).

4. Pri la gvidagado de la esperantistoj

CLEK okazigas minimume trifoje dum jaro dutagajn konferencojn, pritraktas ampleksan tagordon, alprenas decidojn k. t. p.
La laboraktivo de CLEK kunvenas pli ofte, minimume 6 foje dum jaro.
Ĉiu 5a jaro estas elektataj grupestraro, SLEK, DLEK, CLEK. Delegita konferenco, kiun senpage partoprenas 100—150 delegitoj el tuta GDR, elektas en sekreta baloto CLEK (lastfoje 1972, denove 1976). Kooptoj, ŝanĝoj, novelektoj tamen, se necese, pli frue eblas sur ĉiuj gvidebenoj. Sur ĉiuj gvidebenoj okazas ĉiujare plej diversaj aranĝoj, seminarioj k. t. p., kiujn ĉiu ebeno memstare kaj memrespondece en interkonsento kun la pli superaj gvidantaroj okazigas. Kulturligo subtenas per konsiderindaj financaj rimedoj kaj disponigas senpage ejojn, varbadon k. t. p.
Ĉiujare okazas specialaj seminarioj por gvidaj aktivuloj, kiujn plene financas KL Sole 1975 ni okazigis 3 seminariojn kun entute 12 tagoj, kiujn partoprenis senpage ĉirkaŭ 100 esperantistoj, inter ili 50 junuloj ĝis 25 jaroj. Tio kostis al Kulturligo konsiderindan sumon.

5. La prestiĝo de CLEK

CLEK estas en GDR la sola instanco, kiu okupiĝas kompetente pri la organiza kaj faka agado de la esperantistoj de GDR. Ĝi estas kiel sole kompetenta instanco respektata. Ĉiuj presaĵoj pri kaj en Esperanto, ekspertizoj pri Esperanto k. t. p. eĉ demandoj direktitaj al universitatoj, ĝenerale estas transdonitaj al CLEK.
Kompreneble tamen okazas (malofte), ke nefakuloj (ekz. en gazetoj k. t. p.) esprimas malĝustan opinion pri Esperanto. Faka oficiala ekspertizo de CLEK tiam ĝenerale efikas klarige kaj positive ŝanĝige. En sciencaj instancoj estas konata, ke eĉ por la sciencaj aspektoj de Esperanto kompetenta estas sola CLEK (tamen rigardu punkton 10).

6. Varbado

Pli kaj pli ofte la surloka kaj respubliknivela varbado montras sukcesojn. Per prelegoj, broŝuroj, flugfolioj, afiŝoj, gazetartikoloj la scio pri Esperanto en GDR konsiderinde plialtiĝas. Eĉ radiointervjuoj (ankaŭ distrikte)

okazas. La taggazeto „La Mateno“ (100 000 ekz.) ekde 1965 regule aperigas Esperanton-anguleton. Jam aperis la 360a artikolo (!).

La plej grandaj semajnaj revuoj de GDR publikigis ampleksajn artikolojn, i. a.:

— „Freie Welt“ (500 000 ekz.), 4 grandformatoj, ilustritaj paĝoj, 50/1972
— popularscienca „Urania“ (90 000 ekz.) dupaĝa 6/1973
— „Neue Berliner Illustrierte“ (1 000 000 ekz.), plej granda ilustrita semajnrevuo, 2 grandformataj paĝoj, 11/1973
— en la plej prestiĝa semajnrevuo pri internacia politiko „Horizont“ (100 000 ekz.) tutpaĝa grandformata artikolo 26/1975, krome jam 1973 kaj 1974 pli modestaj artikoloj,
— krom tio ĉiujare aperas 100 — 150 pli gravaj artikoloj en la distrikta kaj subdistrikta gazetaro,
— aperis kelkaj sciencaj studoj (vidu punkton 10).

7. Publikigoj

7.1. „der esperantist“

CLEK ekde 1965 eldonadas „der esperantist“, kiu havas ŝtatan licencon kaj troviĝas en ĉiuj pli grandaj bibliotekoj de GDR.
Ĝi aperas 6foje jare, 24 paĝoj, A 5 formato. Ĝis julio 1975 aperis 70 numeroj, t. e. entute 1680 paĝoj.
Entute publikiĝis **pli ol 1400** koresponddeziroj el 30 landoj (po n-ro ĉ. 20 koresponddeziroj).
„der esperantist“ informas pri la en- kaj eksterlanda esperantomovado, pri teoriaj, organizaj kaj fakaj problemoj de la esperantoagado, publikigas literaturaĵojn, distraĵojn k. t. p. Ĝi aperas dulingve (ĉ. 70 % estas esperanta teksto, germanlingvaj artikoloj ĝenerale havas esperantan resumon).

7.2. Aliaj eldonaĵoj de CLEK

a) Aperis ĝis nun ĉe CLEK aŭ sub ties gvido kaj faka kunlaboro:
— 10 numeroj de „Paco“ (MEM), kune 10 × 40 paĝoj = 400 paĝoj, A 4, ilustrita, luksa papero (1966 — 1975)
— lernolibro (ŝtata eldonejo)
— 2 vortaroj Esp./Ger., Germ./Esp. (ŝtata eldonejo)
— gramatiko de Esperanto
— 2 kantaroj
— broŝuro pri Laborista Esperanto-movado
— „Nuda inter lupoj“, romano, 8000 ekz., post 8 monatoj ĉe la eldonejo elĉerpita (ŝtata eldonejo)
Tio signifas entute pli ol 92 600 ekz.

b) aperis krome en Esperanto:
— 4 prospektoj (2 × GDR, Erfurt, Rostock) sume 25 000 ekz.
— „La germana popolo kaj UN“ (60 p.)
— „GDR — bildoj kaj faktoj“ (240 p.)
— „Klereco por hodiaŭ kaj morgaŭ (60 p.)
— „Junularo“ (60 p.)
Tio signifas entute 63 000 ekz.

c) Estis sinkronigitaj en Esperanto 3 koloraj filmoj pri GDR

d) En preparo troviĝas:
— nova romano (Trigroŝa romano“ de B. Brecht)
— katalogo de esperantaj publikaĵoj kaj de aliplanlingvaj projektoj ekzistantaj en GDR-bibliotekoj (ĉ. 5000 titoloj)
— ampleksa vortaro Germana/Esperanto (ĉ. 40 000 vortoj)

- nova lernolibro
- historio de internacia kaj germana laborista movado (ilustrita)
- broŝuroj pri tradicioj de loka laborista Esperanto-movado
- varbbroŝuroj k. t. p.
- verkoj pri sciencaj aspektoj de Esperanto

8. Junularo

Ekzistas speciale Junulara Komisiono (= Junulara Sekcio) ĉe CLEK kun memstara gvidantaro. Ĝi nuntempe havas 200 membrojn kaj troviĝas en fazo de plena reorganizado kaj novvigliĝo. Estas organizataj pli kaj pli ofte speciale junularaj aranĝoj, seminarioj k. t. p.

Ankaŭ evoluas bonaj kontaktoj al la socialisma junulara organizaĵo de GDR (Libera Germana Junularo). En oficiala kontrakto inter LGJ kaj Kulturligo estas fiksitaj ankaŭ la esperantistoj.

Tamen, restas ankoraŭ multe por fari, por ke ekkresku kaj plenagadu vigla kaj forta bone organizita kaj kapabla junulara Esperanto-movado en GDR. La Junulara sekcio estas kolektiva membro de TEJO ek de 1971.

9. Faka agado

CLEK havas jenajn specialajn komisionojn, kiuj okupiĝas pri specialaj fakaj problemoj:

1. Pedagogia-metodika komisiono
2. Komisiono por esplori la historion de la Esperanto-movado
3. Terminologia komisiono
4. Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio
5. Fervojista komisiono.

Ekzistas klopodoj por aktivigi i. a. esperantistajn medicinistojn, teknikistojn, komputistojn k. a. fakulojn konantaj Esperanton. Tamen oni devas noti, ke la komisionoj devas pliaktiviĝi.

10. Scienca agado (Interlingvistiko)

Speciale sukcese agadas la Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio ĉe CLEK sub prezido de lingvosciencisto prof. Falkenhahn (Humboldt-Universitato).

La fakgrupo havas la celon

a) instigi neesperantistajn sciencajn instituciojn serioze kaj kontinue okupiĝi pri la problemo de internacia lingvo, speciale pri Esperanto, ties multaj sciencaj aspektoj, kaj popularigi bazajn sciencajn sciojn pri tio,

b) kolekti sciencajn materialojn pri interlingvistiko kaj esperantologio, arkivigi kaj disponigi ilin al interesitoj,

c) kompili bazajn sciencajn materialojn pri interlingvistiko kaj esperantologio kaj publikigi ilin en sciencaj revuoj,

d) funkcii kiel ekspertizanto,

e) organizi sciencajn kunsidojn (por la 20 diversprofesiaj fakgrupanoj),

f) organizi sciencajn kolokvojn por interesitaj laikaj sciencistoj.

Intervjuo kun Peter Levsen

Red.: Sinjoro Levsen, la fakto, ke 1975 jam la 10-an jaron seninterrompe aperadas en la taggazeto „Der Morgen“ (La Mateno) esperanta angulo, kiun vi gvidas, estas bona kaŭzo por iom konversacii pri tio, ĉu ne?

P.L.: *Jes, certe. La esperanta angulo komencis aperi 11. 4. 1965, do preskaŭ du semajnojn post la fondo de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo. Sed ne mi fondis la angulon sed Paul Lindner (Pali) la bofrato de la konata verkisto Ehm Welk. La 12. 4. 1975, do jam iomete pasis nia jubileo, aperis la 344-a artikolo. Mi redaktas la angulon ek de la 185-a, do ek de januaro 1969.*

Red.: Mi petas vin ion diri pri la celo de tiu esperanta angulo.

P.L.: *La redakcio de „Der Morgen“ instalis tiun angulon kompreninte la signifon de la internacia lingvo Esperanto kaj la neceson helpi la reorganizadon de la esperanto-movado en GDR. Oni devas konscii pri tio, ke la gazeto aperas en pli ol 100 000 ekzempleroj.*

Red.: Do tio signifas, ke oni kaj instruis la lingvon kaj informis pri ĝi?

P.L.: *Tute prave. Paul Lindner unue publikigis kurson por komencantoj (n-ro 1—52). Poste, en la sekvoj 53—185 li aperigis diversajn parte esperantlingvajn artikolojn por profundigi la lingvan scion de la kursanoj. Speciale valora estis la traduko de plursencaj germanaj vortoj de A — Z. Krome aperis informaj artikoloj, premio-konkursoj k. s. Mi mem en la sekvoj 186—190 prezentis elekton da zamenhofaj proverboj kaj de 191—250 kurson laŭ dialoga metodo, iom simila kiel tiu de Andrzej Pettyn (entute pli ol 80 dialogoj). Ek de n-ro 250 ĝis hodiaŭ alternas informaj artikoloj pri la internacia kaj nacia esperanto-movado, pri praktikaj kaj teoriaj aspektoj de Esperanto, ties historio k. t. p., sed ankaŭ anekdotoj, lingvaj ekzercoj k. t. p.*

Ĝis nun ekzistas interesaj rezultoj:

a) Aperis en GDR tri ampleksaj sciencaj studoj pri Esperanto kaj la problemo de internacia lingvo en akademiaj lingvistikaj revuoj (prof. Spitzbardt, D. Blanke),

b) Estis akceptitaj novaj difinoj por la 18-voluma enciklopedio de GDR (Meyers Neues Lexikon).

c) Estis organizitaj tri tre sukcesaj kolokvoj kun lingvosciencistoj (1971, 1974 en Leipzig, 1973 en Jena).

d) Estas akceptitaj por publikigo en plej prestiĝaj lingvistikaj akademiaj revuoj pluaj studoj.

e) Estas aranĝita prelego antaŭ doktoriĝontaj lingvistoj en Humboldt-Universitato de Berlin (majo 1975).

f) Estas en preparo diversaj sciencaj studoj prezentotaj al diversaj sciencaj institucioj kaj por publikigo en- kaj eksterlande.

Red.: Ĉu vi estas kontenta pri la eĥo de la legantaro?

P.L.: *La leteroj de la legantoj estas la sola indiko pri tio, ĉu la kontribuoj trovas atenton, estas bezonaj aŭ ne. Bedaŭrinde nur malmultaj skribas, kaj mi havas la impreson, ke la esperantistaro de GDR ŝajne ne konscias pri la unikeco de tiu 10-jara esperanto-angula serio.*
Krankam oni daŭre postulas, ke en la gazetaro aperu artikoloj pri Esperanto, tamen, se realiĝis tiu postulo en tia ekstreme favora kadro kiel en „Der Morgen", ŝajne oni ne plu interesiĝas pri la propraj postuloj. Tion mi ne komprenas. Jam ofte okazis, ke io estis konstruita per multe da energio, kio baldaŭ kolapsis pro la posta senintereso de tiuj, kiuj unue plej laŭte postulis kaj postuladis.

Red.: Jes, sed eble iuj perdis la superrigardon pri la artikolaro, ĉar kelkfoje ili aperadis ĉiun duan dimanĉon, poste sabate kaj nun, se mi ne eraras, eĉ vendrede.

P.L.: *Vi pravas. Pro teknikaj kaj redakciaj ŝanĝoj dum la lasta tempo estis iuj malregulaĵoj, kvankam tamen la dusemajna ritmo funkciis, kiel povis konstati tiuj, kiuj abonis la tutan gazeton. Sed ek de aŭgusto/septemrbo 1975 la esperanto-angulo denove tute regule aperados (tio signifas ĉiun* **duan vendredon.** *Do 15. 8., 29. 8., 12. 9. 75 k. t. p., k. t. p.)*

Red.: Kiun deziron vi do havas al niaj legantoj?

P.L.: *Mi petas la legantojn de „der esperantist" kaj ĉiujn aliajn interesitojn je la esperantaserio en „Der Morgen", ke ili regule skribu al la redakcio, kritiku (aŭ eble ankaŭ laŭdetu, se necese, ĉu ne?) la artikolojn, proponu la pritrakton de tiu aŭ jena ankoraŭ nepritraktita temo k. t. p. En la manoj de la legantoj troviĝas la plua sorto de la serio. La adreso de la redakcio estas: Der Morgen, 108 Berlin, Johannes-Dieckmann-Straße 47.*

Red.: S-ro Levsen, ni dankas pro la intervjuo kaj esperas, ke tiu via alvoko trovos la merititan eĥon.

P.L.: *Dankon.*

Demografia vortaro esperanta – ĉeĥa – rusa – angla – franca – hispana. eld. Demosta Federální statistický Úřad ČSSR (Institut demografie), Praha 1974, 91 p., mimeogr.

La tre utila vortaro estas verkita de d-ro J. Fousek, J. Kuliková, E. Pitrdleová, Ing. J. Putik, d-ro V. Srb, S. Zedniková kaj Ing. F. Faktorová (redaktorino). Maloftas, ke ŝtata entrepreno enkadrigas en sian fakan terminologian laboron ankaŭ esperanton. La versio esperanta, ellaborita de S. Zedniková servis kiel gvida, laŭ kiu oni aranĝis la tutan vortaron. Ĉar ĝis nun ne ekzistas demografia esperantlingva terminaro la prezentata verko havas specialan meriton.

La antaŭparoloj en la menciitaj lingvoj bone enkondukas la verkon i. a. menciante ke la Federala Statistika oficejo de ČSSR jam ek de 1968 eldonas kvaronjaran bultenon „Demosta", aperanta en angla, franca, rusa, hispana lingvoj kun superrigardoj en Esperanto.

La bulteno Demosta kaj la vortaro estas riceveblaj ĉe Federala Statistika Oficejo, Instituto de demografio, Praha 8, Sokolovská 142.

Magdeburg — Ŝumen

Dum la solenaĵo en Ŝumen, ĉe la pupitro A. Bojadŝiev, prez. de la Esperanto-grupo en Ŝumen, unua vico de maldekstre dekstren: S. Petkov, dua sekr. de la urba partiestraro; N. Aleksiev, prez. de BEA kaj de MEM; prez. de la esp. grupo Varna; prez. de la nacia fronto en Ŝumen; dua vico de dekstre maldekstren: I. Timŝev, prez. de la pacmovado en Ŝumen; M. Trenne, Magdeburg; K. D. Dungert, Magdeburg; d-ro P. Forster, Britio

Inter la esperanto-societo „Vekiĝo“ en la bulgara urbo Ŝumen kaj la laborrondo „Progreso“ en Magdeburg ekzistas jam de unu jaro amikecaj kontaktoj. La 16-an de majo 1975 la ŝumenaj esperantistoj celebris la 70-an datrevenon de la fondo de la societo „Vekiĝo“. Okaze de la solena festado la bulgaraj amikoj invitis magdeburgajn esperantistojn al partoprene. Dank' al *bonega monhelpo de Kulturligo de GDR, kiu pagis la tutajn kostojn por la flugo kaj veturado pertrajna por du ligoamikoj,* povis partopreni en Ŝumen K. D. Dungert kaj M. Trenne. Ĉiujn restadkostojn en Sumen pagis la bulgaraj amikoj. Ni partoprenantoj el Magdeburg restis de la 15-a ĝis la 17-a tagmeze rekte en Sumen, kiel oficialaj gastoj. Alia oficiala eksterlanda gasto estis d-ro Peter Forster, angla esperantisto el Hull. Ni eksterlandaj gastoj loĝis en la plej bela hotelo de Ŝumen, hotelo „Madara“. Tie ankaŭ loĝis dum la tuta tempo la konata kaj eminenta prezidanto de BEA kaj de MEM, Nikola Aleksiev. Dum la ĵaŭda vespero ni magdeburgaj esperantistoj prezentis la koloran filmon „Hieraŭ ili ankoraŭ estis infanoj“ en la nomo de CLR kaj de la esperantistaro de GDR en la sindikata domo antaŭ ĉ. 45 partoprenantoj.

Vendrede ni komune kun la prezidanto de la esperanto-societo “Vekiĝo“ Atanas Bojaĝiev, N. Aleksiev kaj d-ro P. Forster veturis per du taksioj tra la ĉirkaŭaĵo de Ŝumen. En Preslav ni vizitis uzinan E-klubon, kiu havas ĉ. 30 membrojn (el entute 500 laboristoj!). Per la aŭtomobiloj ni krome vizitis tiel tradiciriĉajn kaj pitoreskajn lokojn kiel la vilaĝon Madara kaj la unuan bulgaran ĉefurbon Pliska. La saman vesperon okazis la solena festado en la domo de la armeo en Ŝumen. Sed antaŭ la komenco ni eksterlandaj gastoj havis ankoraŭ ĉ. 15-minutan intervjuon kun raportisto de Radio Ŝumen en Esperanto.

Post la diversaj tre amikaj salutparoladoj estis prezentita kulturprogramo kun bulgara popolmuziko de geknaboj, vestitaj en originalaj popolvestaĵoj, bulgar- kaj esperantlingve. La aranĝon partoprenis ĉ. 80 personoj. Por ni gastoj la vespero finiĝis per granda bankedo por ĉ. 30 personoj en la hotelo „Madara“. Dum la antaŭtagmezo de la sabato ni vizitis kelkajn vidindaĵojn de Ŝumen, kiel la gepatran domon de la eminenta politikisto Ivan Kolarov kaj la turkan Tombul-moskeon. Tagmeze ni devis adiaŭi de Ŝumen kaj de niaj karaj amikoj por reveturi hejmen.

La kvina internacia feriado en Miedzyzdroje 1975

„Unu pafo — duobla trafo!“ mi povis diri, kiam mi revenis de la pola bordo de Balta Maro. Mi travivis belegan sunan veterperiodon de 14 tagoj sur la ideala sabla strando de Miedzyzdroje kun akva temperaturo de 17 ĝis 20 gradoj.

Aliflanke mi spertis ankaŭ la kuneston de 131 esperantistoj el 7 landoj: Bulgario, ĈSSR, GDR, Nederlando, Pollando, Svedio, Hungario.

Multaj gejunuloj estis venintaj. Tio siginifas: multe ridi, multe kanti, multe danci! Tamen oni ankaŭ serioze labroris, aŭskultis lumbildprelegojn kaj perfektigi la lingvan scipovon. Okazis du kursoj por komenantoj, unu paroliga kurso (gvidata en tre afabla maniero de S-ro Olsson el Lund/Svedio) kaj unu metoda kurso.

Tiu lasta estis speciale interesa. La kursgvidanto, s-ro redaktoro Pettyn el Varsovia, instruis laŭ sia dialoga metodo al komencantoj, kaj kursgvidaj samideanoj sidis malantaŭ ili kaj kvazaŭ gaste aŭskultis la dialogojn kaj travivis la evidentan progreson de tago al tago.

Kun granda bedaŭro ni devis aŭdi, ke la Internacia Feriado en Miedzyzdroje ne plu okazos ek de venontjaro pro diversaj kaŭzoj. Kvinjoje esperantistoj el ĉiuj landoj havis la okazon perfektiĝi en nia lingvo kaj samtempe ĝui la bordon de la Balta Maro per sunbruniĝo kaj masaĝado per la ondoj de l'maro. Ĉiuj partoprenintoj dankas tiun eblecon al la malegoisma, modela laboro de niaj altestimataj gvidantinoj Jutta Dolgowska kaj Stefania Palica.

Kiu iam partoprenis tian internacian feridadon, tiu sopiras daŭre al simila kunesto. Ĝin neniu kurso, neniu hejmana vespera kueveno povas antataŭi.

Werner Haupt

(daŭrigo de p. 31)

Post nia vizito ni povas konstati, ke la E-movado en Ŝumen estas pli forta ol nia E-societo en Magdeburg. Dum tiu mallonga restado ni multe lernis de niaj bulgaraj amikoj kaj ni esperas, ke ni multon povos apliki en nia esperantolaboro. Precipe impresis nin la partopreno de eminentaj ŝumenaj neesperantistoj de la urba partiestraro kaj de la urbkonsilantaro dum la solena festado. Certe ankaŭ ludas gravan rolon la longa historio de la ŝumena societo „Vekiĝo“ kompare al nia tre juna kaj ankoraŭ malforta E-societo „Progreso“ en Magdeburg.

M. Trenne

Sukcesan' NOVAN JARON

ni deziras al ĉiuj niaj esperantistaj legantoj en GDR kaj en eksterlando. La nova jaro alportu al ni pluajn sukcesojn en la porpaca batalo kaj en nia esperantista agado.

La redakcio

Pola - Germana Kontrakto

En numero 71 ni publikigis la kontrakton inter Pola Esperanto-Asocio kaj Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR. La bildo montras la solenan akton de la subskribo. De maldekstre dekstren: Inĝ. Boleslaw Staszczak, ĝen. sekr. de PEA; Stanislaw Swistak, prez. de PEA; kom. kons. Rudi Graetz, prez. de CLR; Detlev Blanke, sekciestro en Kulturligo, sekr. de CLR

Eta sed ne de malgranda valoro

Pollando, nombroj kaj faktoj, Eld. Interpress, Varsovio 1974, 75 paĝoj, kolorilustrita.

En tre konciza sed ĵurnalisme tre lerte prezentita formo la broŝuro informas pri la plej gravaj faktoj konigendaj pri nia najbaro. La ĉapitroj estas geografia situo, miljara Pollando, soci-politika reĝimo, Pollando sur la internacia forumo, loĝantaro, mastrumado, vivnivelo kaj socialaj servoj, klarigo kaj scienco, la kultura vivo, la esperantista movado en Pollando, invito al Pollando.

Ĉio-ĉi taŭgas por tuja senkomplika utiligo por prelegoj kaj certe por propra rapida informiĝo.

Kompreneble nin speciale interesas la ĉapitro pri la esperantista movado en Pollando, verkita de la konata radio-ĵurnalisto Jerzy Grum. Estas vere frapa la forteco de la movado en Pollando. La frazo „Oni premisas tamen, ke almenaŭ (almenaŭ!) 100 mil homoj en Pollando konas Esperanton“ (p. 65) ja vere estas sensacia.

La ĉefa estraro de PEA tre malavare disponigis al CLR 400 ekzemplerojn de tiu valora broŝureto.

D. B.

En grava semajna revuo de GDR

La plej grava semajna revuo pri internacipolitikaj problemoj de GDR „Horizont“ publikigis en n-ro 26/1975 tutpaĝan artikolon pri Esperanto sub la titolo „Esperanto — la plej juna lingvo de la mondo“. La artikolo estas verkita de Detlev Blanke, sekciestro por Esperanto en Kulturligo de GDR kaj respondeca sekretario de Centra Laborrondo Esperanto. Foto de d-ro L. L. Zamenhof, frontpaĝo de la „Komunista Manifesto“ kaj du tabeloj (pri konjugacio, deklinacio kaj vortfarado; pri la verkoj de Shakespeare, tradukitaj esperanten) kompletigas la sobre verkitan artikolon.

La aŭtoro enkondukas sian artikolon: „La homo ŝanĝas sian naturan medion kaj ĉiam pli bone scipovas direkti la sociajn procesojn. Ĉu li konscie aŭ „artefare“ ankaŭ povas laŭvole reguli sian lingvon, „la plej gravan rimedon de la interkomunikado de la homoj“ (Lenin), aŭ eĉ krei novan lingvon, kiu estas pli facile lernebla ol la historie estiĝintaj naciaj lingvoj ŝarĝitaj per multaj neregulaĵoj, kaj kiu plifaciligas kiel tutmonda kompenigilo la interkomunikadon de diverslingvuloj? Ĉu la homo povas venki la lingvan barieron?“

Post atentigo pri la kelkjarcentaj klopodoj konstrui internacian planlingvon, Blanke tuj konkludas „La praktikado de Esperanto, publikigita en 1887 de L. L. Zamenhof (1859—1917), jam delonge pruvis: Eblas konscie krei internacian lingvon. Kaj, tion iuj ankoraŭ ne kredas vera, tia lingvo funkcias jam ekde pli ol 8 jardekoj kiel plenvalida komunikilo inter homoj de diversaj gepatraj lingvoj.“

Post klarigo de la motivoj de Zamenhof, krei Esperanton kaj la skizo de konstruo de la Internacia Lingvo, la aŭtoro akcentas la valoron de Esperanto kiel instrumento de la pacbatalo kaj la edukaj kaj klerigaj valoroj de la praktikado de Esperanto.

Li substrekas la signifon de la internacia aplikado de la principoj de paca kunekzistado por la plua evoluo de la internacia kunlaboro, kiu dezirindigas internacian lingvon.

Ne neante la pluan kreskon de la signifo de scio de fremdaj lingvoj la aŭtoro tamen ĉe la fino akcentas: „Sed ŝanĝiĝantaj internaciaj rilatoj estonte postulos novajn, nekonvenciajn formojn de internacia lingva interkomunikado. Estas valore okupiĝi jam nun pri tiuj problemoj. Ĉu internacia lingvo havas estontecon, tio certe ankaŭ dependas de tio, kiel la homaro sukcesos sekurigi la pacon kaj formi la kunvivadon de popoloj sur la bazo de humanismaj principoj“. La artikolo aperis ĝuste en numero kun plialtigita eldonkvanto (pli ol 120 000 ekz.) pro aldonita speciala raportaro pri Portugalio. Tiu artikolo estis la ĝis nun plej grava sukceso, laŭ prestiĝo, en la gazetaro de GDR. Ekzempleroj de „Horizont“ 26/1975 kun esperantlingva traduko haveblas ĉe Centra Laborrondo.

Korekto: La kolora prospekto de Erfurt, prezentita en „der esperantist“ n-ro 70, p. 22 ne estas ricevebla Internationale Gartenbauausstellung sed ĉe Harald Miceel, 50—Erfurt, Hans-Sailer-Straße 97, prezo 1,50 m. Ni petas pardonon pro la misinformo.

Multekosta sandviĉo

LA MONATA MAGAZINO Reader's Digist, kies plurlingvaj eldonoj atingas la eldonkvanton de preskaŭ 30 milionoj da ekzempleroj, antaŭ kelka tempo aperigis jenan kuriozaĵon:

Italo, vizitanta Kanadon, prenis ĉambron en la plej moderna hotelo de Winnipeg. La ĉambro, plenplena je diversaj butonoj, ŝaltiloj kaj aliaj teknikaĵoj, tentis la gaston elprovi kiel funkcias diversaj servoj en la hotelo. Li elektis la telefonnumeron de la akceptejo kaj petis, ke oni en lian ĉambron portu sandviĉon. La oficisto en la akceptejo, kompreninte eĉ ne unu vorton el tio kion la gasto diris, kredis, ke plej prudente estas konekti lin kun la telefoncentralo en Winnipeg. La oficisto de la telefoncentralo, kompreninte same tiel nenion el tio, kion al li parolis la italo, sed aŭdinte plurfoje la vorton „Italio", opiniis, ke la hotelgasto deziras telefoni al Italio kaj tuj konektis lin kun Montrealo. Sed, ankaŭ la oficisto de la montrealo telefoncentralo tute ne parolis la italan. Tamen, surbaze de tio kion li aŭdis de la telefonisto en Winnipeg, li konektis la turiston kun Romo.

Kiam finfine la telefonisto el Romo demandis la italan turiston kion li volas, la hotelgasto, ne komprenante kio intertempe okazis, tute trankvile diris:

„Mi ja jam trifoje diris: mi deziras sandviĉon kun kapsikoj kaj laktuko kaj unu bieron!"

(El „Esperanto" 4/1975)

Idilio sur bordo

de Günter Krone

Sur soleca loko de la bordo ĉe la maro paro sidis kaj senokupe rigardis la ondojn. Jen venis juna, bela blondulino. La paro observis, kiel la knabino kuŝiĝis en proksimo por dormi.

„Vidu", li diris, „kia belega ino. Tiaj koksoj! Tiaj gamboj! Ĝustaj por ekmordi!"

„Se vi ŝatas", ŝi respondis, „provu tion ĉe ŝi. Eble ŝi restas kvieta."
„Mi provos", li decidis. „Eble mi povas surprize preni ŝin."

Volupite li proksimiĝis al la dormantino kaj krimis al ŝi, kion ŝi neniam permesus. Kaj kiam ŝi vekiĝis pro lia faro, li jam estis kvietiginta sian apetiton kaj reiris al sia kunulino.

„Estis ĝuego," li diris gaje. „Mi ĝojas kun vi," ŝi diris milde kaj sen riproĉo.

Tiam ili denove rigardis senokupe la ondojn. Feliĉa paro da kuloj.

Trad. M. Lennartz — El „Der Morgen" 15. 8. 1975

Somera Esperanto-Tendaro (SET) en Lanĉov, ĈSSR - du raportoj

Rudolf Hahlbohm partoprenis la duan kaj d-ro Kalbe la unuan etapon de tiu unika ĉeĥa esperantista tendaro.

La tre aktiva Esperanto-klubo en Třebič, Sudmoravio aranĝas ĉiujare dum julio-aŭgusto en du etapoj internacian tendaron por lernado kaj feriado. Unu etapo daŭras du semajojn kaj okazas en pejzaĝe rava loko, valo ĉirkaŭita per arbaro, apud valbaraĵa lago.

Mi partoprenis ĉijare kun mia familio. Impresis nin precipe kameradeca internacia medio kaj bona organizado. La sukcesoj de SET baziĝas sur strikta ordo, varia programo kaj bona proporcio inter fervora lernado kaj amuza feriado. Ĉiu partoprenanto studis en iu grupo, laŭ lingva perfekteco kaj ekzameniĝis fine analoge. La lernogrupoj kontribuis alterne iom al la necesa tendara laboro kaj la naciecoj al la vesperaj kulturprogramoj. Ni volonte rememoras pri noktaj tendarfajroj, komuna lernado de Esperanto-kantoj, komuna sporto, pri ekskursoj en la belan proksiman kaj malproksiman ĉirkaŭon, piede, per aŭtobŭso aŭ ŝipo. Oni dormas en dulitaj tendoj aŭ kvarlitaj kabanoj. Ni estis tie reprezentantoj de kvin nacioj, diversece laŭ aĝo, de infanoj ĝis pensiulo, sed la kunvivo kaj kunago okazis en modela harmonio.

Niaj samideanoj en ĈSSR plenumas per tio valoran taskon por socialisma internacieco, por disvastigo de la internacia lingvo kaj plibonigo de l'individua lingva nivelo, speciale inter infanoj kaj gejunuloj. Ili faras tion kun longjaraj spertoj kaj kun granda pedagogia lerteco. Jam estas miloj, kiuj trapasis tiajn etapojn. La partopreno taŭgas por homoj, kiuj ŝatas la tendaran vivon, volas perfektiĝi lingve kaj plenumi la tendaran regularon. Por eksterlandanoj jam estas postulata bona scio de la lingvo. Oni atingas SET per trajno al Prago, de tie daŭrigo per trajno al Znojmo, de Znojmo aŭ Šumna per aŭtobuso trans Vranov al Lanĉov.

Rudolf Hahlbohm

La prezo por du semajnoj estas 500 kronoj. Interesiĝantoj por 1976 sin povas direkti al Esperanto-Klubo Trebič, CS–67401 Trebič, ĈSSR.

La red.

Ankoraŭfoje pri Lanĉov

Kiu volas lerni fremdan lingvon, tiu iru en fremdan landon kie oni parolas fremdlingve.

Sed kie estas la lando en kiu oni parolas esperanto? Ni trovis la landon: Lanĉov, malgranda paradizo de l'esperantistaro!

Dum du semajnoj ni tri (bedaŭrinde nur tri germanoj) vivis inter ĉeĥoj, hungaroj, poloj, slovakoj — ni estis granda unulingva familio de preskaŭ cent bonhumoraj samideanoj.

Dum du semajnoj ni neniam aŭdis ian malbonan, tro laŭtan, kverelan aŭ malamikan vorton!

Ni lernis, ludis, manĝis, kantis, trinkis, promenis, kune sub ombraj arboj, ni sidis, kantis, babiladis ĉe tendarfajro kaj dormis en firmaj tendoj aŭ lignaj kabanetoj.

(daŭrigo p. 37)

Abaliget — turisma paradizo en Hungario

Ĉijare mi decidis denove, jam la duan fojon, partopreni la Internacian Renkontiĝon Naturamikan (IREN) — la 8a — kiu okazis la 12.—21. 7. 1975 en Abaliget/Hungario. Mi estis scivolema, ĉu estas diferenco inter la nunjara aranĝo kaj tiu en la jaro 1972, — kaj mi konstatis — jes estas! Ne nur, ke oni povas loĝi en pli belaj kaj pli komfortaj kabanetoj, ankaŭ la programo esti pli riĉenhava ol pli frue.

Krom la ĉifoje okazinta turisma konkurso por orientiĝo kaj la banado en la lago Abaliget oni povis partopreni multajn aliajn turismajn kaj amuzajn aranĝojn. Tio estas i. a. aŭtobusa ekskurso al la fortikaĵo Siklos kaj la termalbanejo Harkány, perpiedaj ekskursoj al la TV turo en Misina, al Orfü k. t. p., vizito en la stalagmita groto de Abaliget. Naĝokonkurso en lago Abaliget montris, kiu scias bone naĝi. Vespere lumbildprelegoj, laga solenaĵo kun lampionoj, Hungara Vespero kun folkloraj dancoj, lardofritado kaj „baloj" pliriĉigis la programon. Ĉiun matenon la partoprenantoj havis eblecon perfektigi la lingvosciojn de la 8a ĝis la 9a horo. Post la rigardado de la urbo Pecs, la lastan tagon, la aranĝo estis finita.

La restado kaj aranĝado de niaj hungaraj esperanto-amikoj al ĉiuj bone plaĉis, sed laŭ mia opinio — kaj ne nur laŭ mia — la ekskursoj parte devas esti ne tiel fortostreĉaj, ĉar ne ciu naturamiko ankaŭ estas kapabla migri kelkajn horojn.

Se vi, kara leganto interesiĝas partopreni la 9an IREN 1976. bv. skribi al la Organiza Komitato, H—7601 Pécs, Pf. 2.

La kotizoj laŭ kategorioj estas de 1100 Ft. ĝis 1700 Ft. por la tuta aranĝo.

Ruth Schonert

Al niaj legantoj:

Kvankam ĉi-tiu duobla numero de „der esperantist" devus ampleksi 48, ĝi nur havas 44 paĝojn. Ni presis por la lastaj 4 paĝoj germanlingvan informfolion pri Esperanto. Se vi deziras havi tiun folion, bv. skribis. Ni ĝin sendos senpage al vi.

(daŭrigo de p. 36)

La tendaro situas apud golfo de la belega valbaraĵo de Vranov. Znojmo. Bitov, Slavonice, Telĉ, Třebič, Jaromêřice, Kralice, Moravské Budjejovice ne estas tro malproksime.

Mirinda estas la bona organizado, ordo, disciplino, la entuziasmo eĉ en lernando en volontula helpo.

Niaj esperanto-amikoj de Trebiĉ estas veraj sindonemaj esperantistoj, perfektaj en karaktero kaj en lingvouzo.

Estis feliĉa tempo — ni volonte revenos estontan jaron. Kiu venos kun ni? Aŭ — pli bone — ĉu ne estus eble, aranĝi ian similan tendaron en nia respubliko?

D-ro Kalbe, Bitterfeld

Soveta numero de „Paco"

Aperis la soveta numero de „Paco" 1974. Kvankam la numero nur venis meze de 1975, ĝi tamen prezentas interesan materialon, bedaŭrinde parte malaktualiĝintan.

Sur bele presitaj kaj bone ilustritaj 36 paĝoj oni trovas apelon „Al popoloj de l'mondo" de CK de KPdSU pri paclaŭreatoj, pri la vizito de L. J. Breĵnev en USONO, pri la pac-kontrakto pri Vjetnamio, la familio de sovetaj respublikoj pri Estonio, Dagestano k. t. p.

Interesaj estas la multaj literaturaĵoj kaj poemoj bone tradukitaj esperanten. Menciinda ankaŭ la parolado de N. Aleksiev 1972 en Moskvo en SSOD-konferenco. Kritiki oni devas la fonetikigon kaj tial kripligon de propraj nomoj kiel Ĝ. Oldriĝ (J. Aldrige), S. Aljende (Allende) kaj la ignoradon de la artikolo.

Oni devas substreki la altan nivelon de la sovetaj „Paco"-numeroj kaj forte deziras ricevi ĉiujare numeron kun *aktualaj* materialoj. Tio sendube forte kontribuos al la plikonatigo de sukcesoj en la evoluo de USSR al esperantistaj amasoj.

Aldonita al la numero estas raporto de L. L. Breĵnev el 1973 „Pri la kvindekjara datreveno de Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj", kiu sur 45 paĝoj tre vigle resumas la vere impresan evoluon de la unua socialisma ŝtato.

G. Korotkeviĉ en GDR

Fine de junio 1975 la Prezidio de Kulturligo akceptis 15-personan delegitaron de iamaj sovetaj kulturfunkciuloj, kiuj agis en Soveta Okupita Zono de Germanio kunhelpinte la rekonstruon de demokratia Germanio. Inter ili ankaŭ troviĝis la konata soveta esperantisto kaj ĵurnalisto Georgi Korotkeviĉ el Moskvo. Li uzis la eblecojn de la dusemajna restado en GDR kaj i. a. renkontiĝis kun esperantistoj en Karl-Marx-Stadt kaj havis en Berlin amikajn interparolojn kun reprezentantoj de Centra Laborrondo.

En Pola Televido

Fine de januaro, en februaro kaj marto 1975, Pola Televido prezentis en la tutpollanda programo prezentaĵon pri Esperanto en tri apartaj partoj. Oni prezentis la lingvon lernatan de infana klaso en Gdansk, ĝian utilecon por praktikaj celoj, enigis eĉ konkurson, kiu rezultigis 1500 leterojn kaj lotumis valorajn premiojn.

Renkonto kun francaj gastoj

Okaze de invito de la komitato de la Asocio de Germana-Franca Amikeco kvar francaj kamaradoj el Rouen (Normandie), la ĝemela urbo de Potsdam, estis gastoj en nia urbo de 26. 4. ĝis 3. 5.

Ili sin volis informi pri la vivo en G.D.R. kaj partopreni la festotagojn okaze de la Unua de Majo kaj de la trideka rememortago pri la liberigo el la ĉenoj de la faŝismo.

Por ni estis ĝojo, ke unu el la francaj gekamaradoj, Pierre Jouvin, estas esperantisto, membro de la grupo en Rouen kaj eĉ membro de MEM. Kvankam la tempo nur estis limigita ni uzis ĝin per multflankaj interparoladoj. La komuna vizito de la kasteloj kaj ĝardenoj kaj aliaj vidindaĵoj en la parko Sanssouci estis okazo por interesaj interparoladoj pri la evoluo en G. D. R. Tiuj-ĉi interparoladoj verspere estis daŭrigitaj en la rondo de la Esperanto-grupo en nia kulturdomo.

Oni diskutis pri la diversaj viv-kaj laborkondiĉoj en ambaŭ landoj. Pro la influo de la ŝtataj kaj privataj komunikiloj la batalo de la laboristaro en Francio por liberigi sin el la ĉenoj de la kapitalismo ne estas facila. Ĉar la salajroj estas malaltaj kaj la laboristoj pro tio ofte ne povas aboni la centran organon de la KPF „Humanité“, ili kelkfoje ne ekscias objektivajn informojn. Ankaŭ la informo pri G. D. R. estas tute malkompleta.

Por niaj junaj membroj estis interese, kiel la junularo en Francio gvidas la batalon por siaj rajtoj. Ni sciiĝis, ke la laboristo devas pagi kiel luprezon por sia loĝejo kvaronon de sia salajro. Tiu-ĉi opiniinterŝanĝo montris al ĉiuj tre klare. ke ni en nia socia evoluo antaŭas tutan epokon.

Multvalora estis por ni la pero de la sciigoj, enhavo kaj taskoj de solidareco. Pierre raportis pri la festo de la „Humanité“, kiu okazas ĉiujare, ĉe kiu ankaŭ partoprenas kulturgrupoj kaj samtempe okazas ekspozicioj. Per la vendo de popularaj kaj folkloraj varoj kaj de socialisma literaturo kaj ne laste per donacoj la festo ĉiam estas sukceso por la K. P. F. La celo estas agadunueco de ĉiuj laboristaj partioj. Dum la festo ĉiam estas instalita Esperanto-pavilono, en kiu oni vendis multajn ekzemplerojn de la famkonata libro de B. Apitz „Nuda inter lupoj“.

Ni estas konvinkitaj, ke tiu-ĉi kunveno instigis ĉiujn partoprenintojn pripensi, kiel oni pli bone povas labori por la internacia solidareco. En Francio suferas la Esperanto-movado pro la multobleco de la opinioj diversaj. La multaj politikaj grupiĝoj malhelpas unuecan Esperantomovadon. Kvankam la grupo en Rouen havas pli ol ducent membrojn ĝia efikeco enkoraŭ estas malvasta.

Je la fino ĉiuj partoprenintoj de ĉi-tiu interesa vespero ĝojis pri la amika atmosfero, kaj ankaŭ la gekamaradoj de Pierre promesis, lerni la internacian lingvon Esperanto kiel ilon por la interkompreniĝo de la popoloj. La amika renkonto estis sukcesa, kaj ni volas daŭrigi la amikecon inter la du urboj.

Potsdam - ano

Amikeco CSSR—GDR

Per tiu slogano de sur la kulturdoma fasado en Ostrov nad Ohři informis niaj ĉehoslovakaj amikoj la publikon pri amika pentekosta renkonto inter esperantistoj el ambaŭ frataj landoj. La 17-an de majo, tradicie kiel jam dum la du pasintaj jaroj, pilgrimis sur diversaj vojoj lingvoamikoj el la Distrikto Karl-Marx-Stadt al Ostrov. Ili sekvis inviton, festi kune kun la najbarlandaj amikoj la 30. datrevenon de Liberigo de la Ĉehoslovaka Respubliko de la faŝisma jugo.

La flanke de la gastigantoj preparita dutaga programo estis varia kaj interesa, pruvis la kulturan rolon de Esperanto. Jam ĉe la inaŭguro, la 17-an de majo, posttagmeze kantis infanĥoro de la 3-a baza lernejo, Ostrov, sub gvido de s-ro J. Svoboda, esperantigitajn ĉeĥajn popolkantojn. Ambaŭflankaj salutvortoj substrekis la signifon de la tago, emfazis nian devon kaj volon, danki por la liberigo far de la Ruĝa Armeo per celkonscia kunlaboro je la novkonstruo de socialisma paca estonteco. Vespere en kafejo de la Kultura Domo prezentis programon la Esperanta Rondo Graslice, alterne kun kantoj de s-ano Smyĉka, solisto de ŝtata opero en Usti nad Labem.

Dimanĉe antaŭtagmeze unuiĝis la partoprenantoj en la festsalono de la Kultura Domo por aŭskulti koncerton. Malfermis la solenan aranĝon infana blovorkestro de la Ostrova popola artlernejo sub gvido de s-ro Stanislav Novák. Plue kantis operariojn s-ano Smyĉka, akompanata sur piano de s-ro Ing. V. Pluhař. Sekvis alterne prezentaĵoj de akordiona muzikensemblo, dirigita de s-ro J. Dvořak. Poemon de J. Wolker „Balado pri okuloj de hejtisto“ deklamis studento de industria lernejo Jan Kabeš. Posttagmeza ekskurso al la „Klinovec“ donis okazon plufirmigi la jam ekzistantajn personajn kontaktojn.

Dum la fina vespera kunveno aŭdigis s-ano Heeg la Lenin-poemon de Joh. R. Becher kaj s-ano Würker prezentis lumbildprelegon pri la temo „La Sovetunio en la VI-a jardeko“.

„Esperanto estas internaciismo en praktiko“. Sub tiu devizo ambaŭ flankoj volis demonsti la praktikan valoron de la Internacia Lingvo sur la sektoro de internacia kunlaboro. Konvinkite, ke la renkonto atingis tiun celon, ĉiuj partoprenantoj disiris plene kontenaj. Nia amikeco translima firmiĝis.

Würker

Semajno en Bansska Bystrica/Slovakio

Tiu travivaĵo-riĉa semajno honore al la 30a datreveno de la liberigo de Slovakio okazis de 20.—26. 7. 1975. Partoprenis ĝin 70 esperantistoj el ĈSSR, USSR, Bulgario, Hungario, Pollando kaj GDR (12 personoj). La partoprenintoj havis eblecojn aŭskulti diversajn prelegojn, viziti fabrikojn kaj vidi filmojn. Speciale impresaj estis la vizitoj de kelkaj gravaj memorejoj pri la komuna batalo de slovakoj kaj sovetaj soldatoj por la liberigo de Slovakio el sub la faŝisma okupacio. La esperantistaj gastoj metis tie memorigajn kaj omaĝajn florbukedojn.

Laŭ rap. de R. Eichler

Soveta Respubliko ĉe Balta Maro

La informa broŝuro pri Estona SSR, kp. „der esperantist“ n-ro 71, p. 15, belkolore ilustrita, haveblas ĉe CLR kontraŭ 1 marko.

VIa tendaro „Esperanto kaj naturo“

Tiu jam tradicia tutsovetia esperanto-tendaro okazis de la 25. julio ĝis 3. aŭgusto 1975 en Helme, suda Estona Soveta Respubliko.

Partoprenis ĝin 210 esperantistoj el 9 sovetrespublikoj kaj 2 aŭtonomaj respublikoj (Rusio, Latvio, Litovio, Estonio, Ukrainio, Belarusio, Armenio, Kazaĥio, Moldavio kaj el Baŝkira, Komi-a ANSU-oj).

Okazis tre interesa Somera Universitato, kies gvidanto, prof. B. Tokarev el Moskvo, prelegis i. a. pri „Tekniko de versfarado ĉe diversaj skoloj de Esperanta poezio“. Prof. S. Podkaminer, Leningrad, prelegis pri „Venkovojo de Esperanto-movado“ kaj „Esperanto en la pacmovado“. A. Ĥarkovski, ĵurnalisto el Moskvo, same prelegis pri la signifo de la internacia lingvo.

Aliaj prelegoj temis pri medioprotekto, lingvo kaj literaturo, poezio, medicino, pedagogio, naturo k. t. p.

La partoprenantoj de la tendaro kompreneble ankaŭ abunde ekskursis, amuzis sin, aŭskultis koncertojn kaj vidis teatraĵetojn.

Laŭ rap. de S. Lomp

Prelego pri grandaj muzeoj

En la kadro de la 13a Sesio de la Somera Esperanto-Universitato en Gyula/Hungario prelegis la muzikpedagogo Rolf Deke el Dresdeno pri la muzea komplekso Zwinger en Dresden. S-ro Deke prezentis faktojn pri la evoluo de Zwinger, pri la porcelan-kolekto, la historia muzeo kaj speciale pri la mondfama pentro-arta galerio kun verkoj de fruaj majstroj. La prelego estis ekipita per lumbildoj.

Japana verkisto — Saotome Katumoto

rakontas pri renkonto kun „Danjo el Vjetnamio“ en Budapeŝto. Li tiam estis same kortuŝita kiel certe nun la leganto de tiu ĉi modesta broŝuro, kiu estas la frukto de kunlaboro de membroj de Ikebukuro-Esperanto-Societo.

Danjo, 13-jara knabino, estis survoje tra eŭropaj landoj por apelacii kontraŭ la milito en Vjetnamio kune kun 3 aliaj gejunuloj, kiam Saotome Katumoto, verkisto raportisto, ĉeestis internacian konferencon en Hungario. Tiamaniere li eksciis tute freŝajn informojn de la fora batalejo Vjetnamio, la sortojn de multnombraj orfaj infanoj, la nekredeblajn kruelaĵojn fare de usonaj soldatoj. Sub tiuj impresoj estiĝis ĉi-tiu libreto enhavanta la travivaĵojn de Danjo. 5 ilustraĵoj, 1 geografia skizo kaj letero de Danjo mem kompletigas ĝin, kiun mi varme rekonendas kaj al geknaboj kaj al gejunuloj kaj plenkreskuloj. Preskaŭ senspire kaj seninterrompe mi legis la klare bonstilan emociigan verketon. La tantiemo de la libro estis sendita al patrinoj kaj infanoj en Vjetnamio — jen japana solidareco!

La libreto estas dissendata de kaj mendebla ĉe Japana Pacdefenda Esperanto-Asocio (Japana MEM-sekcio) ĉe Satoo Yasuo, Ooizumigakuen 777, Nerima-ku, Tokio 177, Japanio.

H. Sauerbrey

Ni danke ricevis:

— *Ib Schleicher:* Systematikken i esperanto, Kopenhagen 1974, 48 paĝoj, tre sisteme kaj moderne prezentita strukturo de Esperanto kun multaj tabeloj.

— *Saotome Katomoto:* Danjo en Vjetnamio, ilustrita de Endo Teruyo, trad. kaj eld. Ikebukuro Esperanto-Societo. 1974, 46 paĝoj.

— *Adolf Holzhaus:* Zamenhof-leteroj, Eld. Fondumo Esperanto, Helsinki 1975, 329 p.

Laŭvicaj kunsidoj de Centra Laborrondo

La dua laŭvica kunsido de Centra Laborrondo ĉijare okazis la 7. kaj 8. junio 1975 en la distrikta urbo Gera sub la simpatia gastigo de la tiea Distrikta Laborrondo. Dum tiu kunsido la membroj de CLR speciale okupiĝis pri diversaj problemoj de la aktuala internacia Esperanto-movado. Sian lastan kunsidon ĉijare CLR okazigis 25. kaj 26. oktobro 1975 en Wittenberg kaj tie traktis la kongresojn de UFA kaj de TEJO. Speciala tagorda punkto traktis la fakan agadon esperantistan en GDR. Detala reporto sekvos.

El la distriktoj

Dresdeno-Ostrava

Ek de la jaro 1973 la E-grupo de Dresden kontaktas kun la E-grupo de ĉeha urbo Ostrava, bonvenigis 1974 grupon de Ostravaj esperantistoj sub gvidado de la prezidanto de tiea grupo s-ro D. Koĉvara, kaj interkonsentis pri kunlaboro kaj reciprokaj vizitoj.

Ĉi-jare Dresdenanoj vizitis la ĉehan urbon Ostrava en la tempo de 13 ĝis 15. 6. 1975. Oni preparis bonan programon por nia restado inter ili. — I. a. la grupo povis partopreni E-kunvenon en la urbo Frýdek Mistek kaj vizitis la Ostravan regionon kun siaj interesaj vidindaĵoj. La partoprenantoj, kiuj estis tre kontentaj pri la programo tre kore dankas al s-ro Koĉvara s-ino Bartovská kaj al ĉiuj aliaj samideanoj, kiuj favore kaj senlace helpis al la gastoj el Dresdeno pasigi neforgesemajn horojn en la ĝemela urbo Ostrava.

Laŭ raporto de E. Berndt

VI-a distrikta renkontiĝo en Neubrandenburg

Ĝi okazis la 1. 6. 1975 en la salonoj de la kulturliga klubdomo en ĉeesto de delegitaro el Koszalin kaj Poznan, Pollando. Salutparoladis s-ro Baranowski el Koszalin Grandan atenton vekis la rememoroj de s-ro Jan Poplawski, iama oficiro de la pola armeo, kiu dum la milito estis en milita kaptitejo de Neubrandenburg kaj tie gvidis ilegalan esperanto-kurson. La distriktestro W. Pfennig raportis pri la laboro farita kaj farenda, kaj la gvidantino de la junulara aktivo, Marion Stein, fervore alvokis al junulara agado.

La sekretario de CLR, D. Blanke, prelegis pri la temo „Sciencaj aspektoj de Esperanto". La Distrikta Laborrondo Esperanto kaj la Koszalina filio de Pola Esperanto-Asocio intertraktis pri la plua agado. Raportis la gazetaro kaj radio-stacio de Neubrandenburg.

Laŭ raporto de Brunhilde Pfennig

Spertinterŝanĝo en Zwickau

En Zwickau la 15. 3. 1975 renkontiĝis kursgvidantoj kaj progresintoj de la distrikto Karl-Marx-Stadt por pliprofundigi siajn lingvajn kaj fakajn konojn. S-ro Nier prelegis pri la urbo Zwickau, speciale pri la historio de la tiea laborista movado. Pri Thomas Müntzer prelegis s-ro Weiß, kaj la ondojn de la diskuto incitis s-ro Würker prelegante pri problemoj de la vorttrezoro (neologismoj). S-ro Hagemann okupiĝis pri geografiaj nomoj kritikante la poŝatlason el ĈSSR. K. Raabe prilumis la sociajn aspektojn de la movado por internacia planlingvo. Je la fino de la interesa „senkrokodila" seminario s-ro W. Weißbach prezentis lumbildojn pri la Altaj Tatroj. Entute tre utila kunveno por pliperfektigi siajn lingvokonsojn.

Laŭ rap. de Gerda Raabe

Intensiva kurso

En la kampadejo Altfranken ĉe Dresden 30 progresintoj povis plibonigi siajn lingvo-konojn en intensiva kurso de 19. — 24. 10. 1975. La kurso estas tre sukcese gvidita de s-ino Stefania Palica el Pollando. Malgraŭ la nebona vetero la kursanoj, plenaj de lernfevoro, profundigis konsiderinde siajn esperanto-lingvajn sciojn.

KORESPONDDEZIROJ

Rumanio

Geprofesoroj dez. kor. k. profesoroj el ĉ. landoj:
Prof. dr. Cezar Apreotesei, **1900 Timisoara,** Bd. Leontin Salajean 25
Lektor Ionel Stan, **1900 Timisoara,** Str. Siretului nr. 1
Prof. Cornelia Staiciu, **1900 Timisoara,** Str. I. Ranghet nr. 31
Prof. Herta Tarfulea, **1900 Timisoara,** Bd. Eroilor nr. 7 D
Cosma Dorin, Str. V. I. Lenin, Bloc B 4, ap. 9, **Calafat,** jud. Dolj
Gutuleanu Alexandru, Str. Primaverii nr. 60, **Craiova.** jud. Dolj
Radnai Erica, **1900 Timisoara,** Str. 6 Martie nr. 6, et. II, ap. 16
Prof. Mirela Frigioiu Danila, **1900 Timisoara,** Bd. Gh. Lazar, Bloc A 1, ap. 84, Circumvalatiunii II
Prof. dro Toma Ďordea, inĝeniero, **1900 Timisoara,** Str. Narceselor nr. 3, ap. 14
Docentino dr. Maria Mihailescu, Institutul de medicina, **1900 Timisoara,** Piata 23, August nr. 1
Prof. dr. Virgil Barbu, Str. Odobesti nr. 2, scara A, et. 1, **1900 Timisoara** (inĝeniero)

Studentinoj dez. kor. k. studentoj el ĉ. landoj

Studentinoj dez. kor. k. studentoj el ĉ.landoj
Ledrer, Victoria, Str. Vasile Roaita, Bloc 11, ap. 14, **Petrosani-Hunedoara**
Lautas, Anita, Str. Rasaritului, Bloc 4, scara 2, ap. 14, **Rsita,** jud. Caras-Severin
Calangiu, Elena, Str. Dimitrie Cantemir nr. 16, **Lugoj-Timis**
Bogdan, Silvia, Str. Golului, Bloc K, scara A, et. II, ap. 9, **Resita,** jud. Caras-Severin
Lupu, Maria, **1900 Timisoara,** Facultatea de filologie, Bd. Parvan nr. 4
Bosoanca, E., **1900 Timisoara,** Facultatea de filologie, Bd. Parvan nr. 4
Boboiciov, Ioan, com. Dudestii-Vechi nr. 974, jud. Timis
Maria Huberth, **str. Morii Nr. 16, 370 Oradea-Seleus,** dez. kor. k. gejunuloj
Fraŭlo, 18jara, dez. kor. kun fraŭlino: Trifan Craciunescu, str. Aural Vlaicu 57-A, **5800 - Suceava**
Fraŭlo, 18jara, dez. kor. pri sporto, kol. bk.: Mihai Curelar, str. Lautarilor 19, **5875 - Radauti - Bucovina**
Fraŭlino, 17jara, dez. kor. pri sporto, amikeco: Rodica-Mariana Rusu, str. Coŝbuc 6, **5875 - Radauti - Bucovina**
Junulo, 16jara, kol. bk, pm: Marta Csuka Mayki, Ciocaia 324, **Bihor**
Fraŭlo, 18jara, dez. kor. pri sporto, kol. bk: Precop Doinel, str. Popa Sepca 12, **5875 - Radauti - Bucovina**
Fraŭlino, 18jara, dez. kor. pri medicino, Rodica Tenciu, LS - Bul 1. Mai 21, **5806 - Suceava**
Fraŭlino, 18jara, dez. kor., kol. insignoj, moneroj ktp.: Netea Paraschiva, LS-Bul 1. Mai 21, **5806 - Suceava**
Fraŭlo, 19jara, kol. aviadilajn modelojn, bk.: Mihai Greculesi, Al Pinului 4 - 4, **5801 - Suceava**

Soveta Unio

3 Junulinoj, 15 — 16jara, dez. kor., kol. pm, bk, gramafondiskojn. Kai Semevsky, **202900 Viljandi,** str. Loode 7—24, Estn. SSR
Marika Arr, **202900 Viljandi,** str. Paala 12—2, Estn. SSR
Tiit Kaasik, **202900 Viljandi,** str. Suur-Kaare 41—21, Estn. SSR
Lernantino, 16jara, dez. kor. k. esperantistoj el GDR, interesiĝas pri lando kaj vivo. Nataŝa Bessalaja, **322910 Nicopol,** Dnepropetrovskaja red., str. de Dilenko, 58 1. 4.
Instruistino, de kemio, 30jara, dez. kor., kol. filatelaĵojn, Anna Cibulskaja, str. Kosmiĉeskaja 120, kv. 11, **330058 Zaporojje**
Se vi volas ricavi E-aĵon el Sovetunio, bv. sendi kelke da ilustritaj poŝaj kalendaretoj al: D. Kolker, obonkesto 649, **Zaporojje**
Studentino de pentrado dez. kor. pri ĉ. t. tutmonde: Juraté Važgauskaité, **232 000 Vilnius-C,** Centrinis Paštas Iki Pareikalavimo, Litovio
Inĝeniero 24jara dez. kor.: Priit Kaldma, **Tallinn 200007,** Luha 35-11, Estonio
20 Gekomencantoj, 14 — 18jaraj, dez. kor. Joniškelvi, gimnazio, **Špokauskaite Dalia,** Litovio
Div. gesiberianoj dez. kor. kun ĉ. lando pri ĉ. t.: K.I.A.-E-Sekcio, **660075 - Krasnojarsk,** pk 2420, Siberio
Inĝeniero 50jara, dez. kor. pri kino, literaturo. kol. pm.: S. Brodlavin, **190031 Leningrad,** Dovostr. 31
Membroj de klubo „Espero" dez. kor. individue aŭ kolektive pri ĉ. t. (aĝo 17 — 37 j.) Bv. skribi al: Natali Dolganova, **Sizran - 10,** Kujb. reg., str. Ggola 12 — 7

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto).
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60. Fernruf: 2 20 29 91
Verantwortl. Redakteur: Detlev Blanke. Redaktionskommission: Otto Bäßler, Werner Pfennig, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. - Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
III-12-8 840